Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 21 — Trimonata

4/91

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: ERTL István

Teknikaj redaktistoj: Stefan MacGILL
KOVÁCS Márta

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

MacGIIL, Stefan, Tri tabuaj demandoj (novjara medito de la prezidanto)..... 1
RÁTKAI, Arpád, Kiuj kaj kiom da lingvoj denaskaj? 8
FRANK, Dr. Helmar, BARANDOVSKA, Dr Vera, Lernplifaciligo
pro antaŭmetitaj lingvokursoj 11
Stipenidio Ivo Lapenna / Enketilo 92 pri universitata instruado 15
MALOVEC, Miroslav, Kiel komunikos la unuiĝinta Eŭropo? 16
HORST, v.d, Mila, Konkurso por vidbenda instru-kurso 18
BARCSAY, Zsuzsa, Invito al la ILEI-Gimnazio (ILEI-labortable)..... 19
SMIDÉLIUSZ, Katalin, Instruado de Esperanto en la
Pedagogia Altlernejo de Szombathely en la studojaro 91/92 21
KURUCZ, Géza, Io, kio mankas en nia laboro (Internaciaj konkursoj) 23
FORSMAN, Lars, Karlskoga komunikas (8-semajnaj kursoj du-nivelaj) 24
RECENZOJ (Ertl, Klag, MacGill, Golden) 25
LETERKESTO (Pirlot, Lineckij, Grosjean) 32
ILEI-labortable (bis): Buĝetoj ILEI; kurantaj novaĵoj; IPR en 1992 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Stefan MacGill, Esö 7.III, H-1034 Budapest, Hungario.
Mesaĝoj tra HEA: (36 1) 1560.244 (telefone aŭ fakse)
Kunordigado, planado, eldonado, rilatoj UEA kaj la movado.

Vicprezidanto : Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono;
tel.(314) 869-2303
Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj

Sekretario : Marija Beloševiĉ, Miškinina 130, YU-4100 Zagreb-Crnomerec, Kroatio,
Jugoslavio;tel. (38 41) 57.60.92
Landaj sekcioj, membro-varbado, ekzamenoj

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby;
tel. (46 415) 501.52
Financo, konferenca organizado

Vic-sekretario : D-ro Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept. 29-34,
North Part, Huazhong Normal Univ., TJ-430070 Wuhan, Ĉinio
Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio

Estrarano pri instruado Barcsay Zsuzsa, Bem Rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario;
tel. (36 1) 201-2342
Servoj al instruistoj, metodikaj kursoj, trejnado de instruistoj.
Faka programo de Konferenco 92

Estrarano pri universitatoj D-ro So Jinsu, Koreio, Dept. de Ekonomiko, Univ. Kangnam,
Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900;
tel. (0331) 281-5500, faks (0331) 281-3604
Universitatoj, Konferenco 1994

NOVJARA MEDITO DE LA PREZIDANTO:

Tri tabuaj demandoj

En la lastatempaj numeroj de IPR aperis artikoloj pri nia konferenca temo: la unua estis represita (neatendite!) en revuo *Esperanto*, kaj provokis kelkajn vervajn reagojn. El la dua artikolo fontis la Proklamo de Voss, ankaŭ aperigita en *Esperanto* (oktobre) kune kun raporto pri nia Konferenco. Okaze de la novjaro, permesu al mi pluiri laŭ la komencita vojo, ĝis la atingo de tri tabuaj demandoj, kiujn ni evitas alfronti. Eventuale nur du el ili estas aktuale tabuaj, la tria kuŝas pli en la lando de revoj ankoraŭ.

Dum la 'Tago de la Lernejo' en Bergeno, tri afiŝoj tiris multan atenton. Ni reproduktas ilin ĉi tie en malgrandigita formo, kaj tenas la nigra-blankajn originalojn en A4-formato en Budapeŝto. La unua montras grafike la disdividon de la lingvoj en la mondo laŭ denaskaj parolantoj. Ĝi emfazas, ke neniu lingvo grandskale superregas laŭ tiu kriterio: deko da lingvoj havas pli ol 100 milionojn da parolantoj. El tiuj plej kreskas la denaska parolantaro de la araba, la hispana, la indonezia kaj la bengala. Apenaŭ kreskas tiuj de la rusa, angla kaj la eŭropaj lingvoj. Poste sekvas trideko da lingvoj kun parolantoj inter 50 kaj 100 milionoj, kun ĉ. 150 lingvoj havantaj pli ol miliono da parolantoj.

La dua diagramo celas grafike elstarigi tion, kion ni jam pli frue komentis. Se ni supozas milionon da parolantoj por Esperanto, kaj la ekziston de 3000 lingvoj en la mondo; Esperanto jam superas 97% de tiuj lingvoj laŭ nombroj de parolantoj. Iusence ĝi jam trovas sin, se ne inter la 'grandlingvoj', tamen inter la 'mezgrand-lingvoj'. Jam kialo por esperantistoj fieri, kaj por lingvistoj atenti.

Sed kiom pravigebla estas la aserto pri miliono de parolantoj de Esperanto? La pli frua tendenco deklari kaj eĉ fanfaroni pri multaj milionoj – kiun partoprenis eĉ renomaj kaj pli-malpli senpartiaj lingvistoj – ŝajnas nun malkreskinta, kaj regas iom pli realismaj imagoj. Tiom nekalkuleblaj ni ne estas. Nia tria tabelo klopodas aliri la demandon el alia direkto: se estus miliono, precize en kiuj landoj ni devus trovi ilin? Kelkajn landojn ni povas pritaksi surbaze de multaj faktoj, aliaj malpli certas, kaj ĝuste la atingo de la miliono dependas grandparte sur supozoj pri Sovet-unio kaj Ĉinio. La sola alia savilo estas akcepti tre altan proporcion de neorganizitaj esperantistoj. Nia kalkulo supozas ilin inter 3- kaj 4-oblo de la organizitaj. Aliaj pretus imagi ilin je la 20-oblo – kaj jen la fonto de la multaj milionoj. Vendoj de vortaroj, lernolibroj, registriĝo en kursoj devus liveri indikon pri la pravigebla obligo – ĉiam lasanta la demandon pri la minimuma lingva nivelo meritanta la epiteton 'uzanto de Esperanto'. Eblas argumenti, ke tiu nivelo ne estu same rigora por internacia lingvo, kiel por nacia. La manko de denaska parol-komunumo kiu donus mo-

delon kaj provizus vastan fonton de instruistoj, kaj la manko de kontinua parol-teritorio kien povas venadi lernantoj por trempiĝ-lernado ambaŭ pledas por malpli rigora difino de tiu 'minimumo'. Aliflanke, la relativa facileco de la lingvo, niaj pretendoj pri ĝia vivanteco, kaj la fakto, ke novuloj konscie elektas la lingvon kaj sekve havas eksterordinaran motivadon, igus nin rezisti la tenton malaltigi la akcepto-nivelon por inkludi la 'Bona tago' esperuntistojn.

Bonvolu rigardi nian analizon kaj kritike ekzameni la ciferojn por via parto de la mondo, aŭ partoj, pri kiuj vi estas bone informita, kaj juĝu, ĉu nia takso estas realisma, naive troigita, aŭ malsufiĉa. El tio tiru proprajn konkludojn.

Kial al ni gravas scii pri la nombro? Plej malgrave, mi dirus, pro la publikeco. Tamen, estus bone povi respondi tiun eternan demandon de ĵurnalistoj iom fakte kaj ne per evitigaj aludoj al ŝak- kaj aliaj -antoj. Pli esence, ĝi helpas firmigi nian propran komunan memkonscion kaj ĝuste vidi nian lokon, sorton aŭ destinon — nek sub- nek super-takse.

Nun mi invitas vin dum viaj silvestraj sonĝoj, eĉ pli aŭdace promeni sur la primedita vojo. Tuj mi konfesas mian nefakecon kiel gvidanto, sed devus kuŝi ie la soci-demografoj, kiuj povus sciencnivele esplori la demandojn, kiujn mi volus levi. Ili estas:

1) Kiu estas la minimuma nombro de parolantoj por ke internacia lingvo restu klare stabila kaj ekster minaco?


2) Kiom da novaj lernantoj necesas eduki jare por teni tiun minimuman nombron da parolantoj?

3) Ĉu ekzistas pli alta nombro de parolantoj, ekde kiu la lingvo prosperus kaj kreskus pro sia uzantaro kaj ne plu bezonus tradiciajn movadanojn flegi kaj subteni ĝin?

1) **Minimuma kritika maso:** Demograf-lingvistoj kapablas determini iun kritikan minimuman grandecon por parol-komunumo de nacia lingvo, sub kiu oni ne rajtas konsideri ĝin ekster la iom-post-ioma minaco de ekstermo. Tiu nombro laŭ iuj kuŝas je ĉ. duona miliono; centoj da lingvoj troviĝas je pli malpli tiu nivelo, kaj estas sub daŭra atako de najbara aŭ monda lingvo kaj kulturo. Kompreneble, politikaj kaj lingvo-politikaj cirkonstancoj influos la nombron, sed iuspeca dinamika ekvilibro tamen donas al ĝi iun prognozeblon; nome, se kulturo aŭ lingvo estas sisteme persekutata, iom post iom leviĝas defendaj fortoj kaj kreskas kohereco kaj konscio ene de la komunumo. Karakterize de tiaj komunumoj estas la aktivado de idealismaj premgrupoj, ne tute malsimilaj al esperantistoj, batalantaj vivtenigi gazetojn, lernejojn, konferencojn, radiostaciojn ktp.

LINGVO-PASTEĈO

Proporcioj de denaskaj parolantoj de la lingvoj de la mondo.




La indikoj estas nur proksimumaj ĉar la proporcioj daŭre ŝanĝiĝas kaj malfacilas akiri fidindajn informojn.

Estas evidente, ke la kritika minimuma maso por internacia lingvo estos pli ol por nacia – pro konataj kialoj: malpli intensa uzo, malforta parola kaj ĉiutaga uzo, malmulta ŝtat-nivela apogo, diseco de parolantoj. Ĝuste ĉar esperantisto kontribuas signife al la vivteno aŭ fortigo de la parol-komunumo pere de siaj internaciaj kontaktoj – la centoj da miloj da supozataj sed izolitaj parolantoj en Ĉinio kaj Sovet-unio ne povas ludi sian plenan rolon.

Mi intencas herezumi kaj sen pravigoj antaŭmeti la tezon, ke tiu kritika minimumo por internacia lingvo devas stari je proksimume unu miliono. Mi invitas scienc-nivelajn apogojn aŭ dementojn, same intuiciajn reagojn de nefakuloj – ĉu hororŝrikaj denuncoj, ĉu konsento.

Vi jam deduktis, ke mi opinias la nombron de parolantoj kuŝi ie en apudeco de tiu minimumo; tion vi eble opinias pesimisma juĝo. Ne tiom. Mi per tio ne volas aserti, ke Esperanto estas en danĝero da baldaŭa pereo – nia centjara historio atestas la fortikecon de la lingvo kaj ĝiaj parolantoj trasuferi kaj venki la plej terurajn atakojn – fizikajn kaj politikajn. Tamen, mi volus pretendi, ke la esperantistoj ne rajtas supozadi la pozicion eksterduba. Unu generacio da neglekto sufiĉus porti la lingvon en akute vivdanĝeran staton. Niaj

LINGVOJ DE LA MONDO VICIGITAJ LAŬ LA NOMBRO DE PAROLANTOJ



SUPOZOJ: En la mondo estas 3000 lingvoj (konservativa takso). Esperanton parolas 1 miliono (preskaŭ defendebla aserto.)

KONKLUDO: Esperanto jam en cent jaroj superis 97% de ĉiuj lingvoj de la mondo!

informaj, aplikaj kaj instruaj klopodoj devas en ĉiu generacio funkcii kaj funkcii aktuale, kreante la venontan.

Ĝuste en tiu punkto la Manifesto de Raŭmo pleje maltrankviligas. Ĝi preteratentas la rolon kaj neceson de efika kaj konsekvenca instruado de la lingvo. Dementante naivan pracelecan 'finan venkon', ĝi samtempe riskas supozigi, ke kreskigaj agadoj ne plu necesas. Ni devas konscii, ke kreskigaj agadoj ne aŭtomate portas al kresko, multfoje ili sufiĉas nur por konservi la ekzistantan nivelon aŭ por bremsi malkreskon. La kultura evoluigo sopirata de la Manifesto efektive povas havi kreskigan efikon, sed eble ne sufiĉan por nia nuna situacio. Bone, ke estu Raŭmistoj, kaj ke ili prosperu, sed nuntempe, ni ne ĉiuj rajtas nur Raŭmismi.

2. Nombro da novuloj: Ni prenu bazan popolon de unu miliono. Se ni supozas averaĝan vivodaŭron de 70 jaroj (iom tro bonkora supozo konsiderante la tutmondigon de la komunumo), ĉiujare mortas averaĝe 1,3% de la tuto, t.e. 13.000 parolantoj. Pli granda proporcio rezignas pri la lingvo, ni diru la duoblon: 27.000. Sekve ni devas krei 40.000 novajn parolantojn ĉiujare. Nun ni devas fari supozojn pri la efikeco de nia varbado kaj instruado: mi prenos la ciferojn 5% kaj 20% respektive. Sekve, ĉiujare ni devus logi 200.000 personojn al komencantaj kursoj kaj porti informojn aŭ ekzemplojn pri la lingvo kaj ĝia aplikado al 800.000 personoj, aldone al la konstanta laboro altigi la lingvan, kulturan kaj aplikadan nivelon de la ekzistantaj parolantoj.

La supra skemo estas evidente simplisma; la formoj kaj gradoj de kabeiĝo estas senfinaj, la sukces-procentoj de kursoj varias de 1% ĝis 100%. Tamen, ĝi havas iuspecan utilon, sugestante al ni la skalon de la tasko antaŭ ni.

Ankaŭ pri la skalo de nia nuna laboro ni estas nur malbone informitaj, spite niajn grandajn klopodojn akiri datumojn. Du jaroj da enketado liveris al ni sciojn pri nur ĉ. 10.000 lernantoj, se ni aldonas taksojn pri la nerespondintaj landoj, ni eventuale atingas 50.000 – kvarono de la pretendata bezono.

3. Maksimuma kritika maso: Ĉu troveblas alia kritika nombro, kiu interesu nin? Same temas pri iu kritika maso. Tio estas la nombro de uzantoj necesaj, por ke la lingvo ruliĝu je sia propra momentumo kaj estu memregenera, sen la konstanta neceso je atento de movademaj esperantistoj, t.e. ekde kiam ni ĉiuj povos senriske ĝui la lukson raŭmumi, trempante kaj plaŭdante en kulturaj basenoj. Pool ('The World Language Problem' en *Rationality and Society*, Vol 3, No 1, 1991) demonstras angla-lingve kaj per esotera matematiko, ke tia kritika punkto verŝajne ne ekzistas, ekde kiu artefarita lingvo kreskus nehaltigeble kaj fariĝus universale aplikata. Sed tiom altan atingon mi ankaŭ ne pretendas. Sufiĉus, ke la lingvo iĝu mem-regenera, vaste uzata, alirebla al ĉiu deziranto, kaj samtempe, ekster la rego de nunspecaj movadanoj. Herezante plu, mi proklamus tiun sojlon troviĝi ie inter 30 kaj 50 milionoj. Grandskalaj desupraj adoptoj de la lingvo ne nur malverŝajnas sed ankaŭ riskas misfunkcii kun desuba

popolo malpli multa ol tio – se ne de parolantoj almenaŭ de aktivaj subtenantoj.

Jen pozo de supozoj, esperantaj je reagoj kaj meditoj.

Inter viaj novjaraj rezolucioj, bonvolu kontroli, ke...

- vi jam raportis pri kursoj en via mondangulo laŭ la enketilo en n-ro 91/3.
- via instruado atingu tiom da personoj, kiom eble,
- ĝi estu tiom efika kaj pozitiva kiom eble,
- vi kaptu ĉiujn okazojn enkonstrui internaciajn kontaktojn en viajn instruplanojn.
- vi laŭeble partoprenu la konferencon aŭ aliajn aranĝojn de la Ligo en 1992.

Prosperan kaj sukcesan novan jaron al ĉiu membro,

deziras,
Stefan MacGill, prezidanto

Nombro de parolantoj de lingvoj (en milionoj)

Denaskaj parolantoj		Loĝantoj de landoj, kie la lingvo estas oficiala.	
Mandaren-ĉina	1000	Angla	1400
Angla	350	Mandarenĉina	1000
Hispana	250	Hindia	700
Hindia	200	Hispana	280
Araba	150	Rusa	270
Bengala	150	Franca	220
Rusa	150	Araba	170
Portugala	135	Portugala	160
Japana	120	Malaja	160
Germana	100	Bengala	150
Franca	70	Japana	120
Panjaba	70	Germana	100

Fonto: The Cambridge Encyclopedia of Language; David Crystal, Cambridge, 1987.

La maldekstraj ciferoj formas la bazon de nia afiŝo. Pli interesus nin scii la nombron de faktaj parolantoj, denaskaj kaj kapablaj nedenaskaj. Tion ne vere prezentas la ciferoj dekstre. Ili simple adicias la nombron de loĝantoj en ĉiuj landoj, kie la koncerna lingvo estas oficiala. Sekve, ekzemple, por la angla, ĝi inkluzivas amason da loĝantoj de Hinda Unio, kiuj apenaŭ aŭ tute ne parolas la lingvon, dum ĝi ekskludas skandinavojn kaj aliaj, el kiuj multaj rimarkinde bone ĝin parolas.

SE ESTAS MILIONO DA ESPERANTISTOJ KIE NI DEVAS TROVI ILIN ?

AZIO	Ĉinio	500.000	560.000
	Japanio	25.000	
	Irano	15.000	
	Koreio	10.000	
	Ceteraj	10.000	
	Sovet-Unio	260.000	260.000
EŬROPO	Skandinavio	8.000	130.000
	GB, NL, B, L	10.000	
	F, D	15.000	
	E, P, I, GR,	12.000	
	CH, A	3.000	
	YU, BG, R	40.000	
	PL, CS, H	40.000	
	Ceteraj	2.000	
AFRIKO	Norda	2.000	6.000
	Centra	2.000	
	Suda	2.000	
AMERIKO	Norda	7.000	28.000
	Centra	3.000	
	Brazilo	10.000	
	Cetera	8.000	
OCEANIO	Aŭstralio	1.000	3.000
	Cetera	2.000	

Ĉu vi opinias la taksojn por via mondparto realisma?
Kiel ni difinu 'Esperantisto'?
Ĉu vi kredas, ke estas pli aŭ malpli ol miliono?

987.000 ≈ MILIONO

Kiuj kaj kiom da lingvoj denaskaj?

RÁTKAI Árpád

Eduko de denaska esperantlingvulo signifas edukon de du- aŭ trilingvulo. Tial la gepatroj unue informiĝas: kiujn lingvojn ili elektu kaj kiu maniero estas la plej taŭga por transdoni la lingvojn al la infanoj?

Antaŭ ĉio oni konsciu, ke la alproprigo de lingvo dum la unuaj vivojaroj ne estas lernado en la lerneja senco de la vorto, la gepatroj *ne instruos* la lingvon. Infano *ne intencas* lerni lingvojn, eĉ estas tute indiferenta je ili. Sed bebo ekde sia naskiĝo per elementa forto volas komunikiĝi kun aliaj personoj, kiuj komence kutime estas la gepatroj. Rimedo de la komunikado povas esti io ajn, kiun la infano povas percepti per siaj sentorganoj.

La plej praaj komunikiloj estas la gestoj. Bebo avide imitas la gestojn kaj vigle komunikas, pli kaj pli memstare (t.e. ne nur imitas), per mimiko (rideto, ktp.), per la membroj (montro per mano, ktp.), eĉ per sia tuta korpo, per diversaj pozoj. Komunikado okazas ankaŭ per simplaj sonoj, kiuj same signifas ion, kiel la gestoj.

Lingvo estas signosistemo de parolsonoj, konsistanta morfemojn kaj vortojn, kiuj esprimas pensojn kaj estas instrumento de la socia komunikado. Alproprigo (pli trafa esprimo, ol lerno) de lingvo daŭras longe, dum jaroj. Infano koncentras sian atenton al la persono, kun kiu li/ŝi komunikadas, al la enhavo de la komunikado, sed ne al la lingvo – dum la unuaj jaroj eĉ ne komprenas, kio estas lingvo. Jam posedante lingvon, 3–5-jara infano okaze ekkomprenas, kio estas lingvo. Sed tiu malkovro ne estas por li speciale interesa, temas nur pri unu el la multaj novaĵoj, kiujn ĉiutage li renkontas. Samtempe li ankaŭ tion ekkomprenas, ke li (eventuale) parolas du aŭ tri lingvojn. Sed ankaŭ tiu fakto ne estas interesa aŭ grava informo por li – certe malpli grava, kiel ekz. la moviĝo de skarabo. Infano *komunikadas,* kaj dum tiu agado tute akcesore, neintence, ne konscie alproprigas lingvon.

Kiun lingvon infano alproprigas? Iun ajn. Por li ne estas facilaj aŭ malfacilaj lingvoj, eĉ lingvoj ne estas, nur komunikado. Ĉu la lingvo estas korekta aŭ fuŝita, tutegalas. Li precize tiun alproprigas, kiun lia *modelo*, la adoltulo parolas. Se la modelo parolas iun miksaĵon de lingvoj, por la infano tiu estos tute originala (signo)sistemo, kiun li alproprigas ĝuste tiel. Ja temas nur pri unu tutaĵo, pri la komunikado kun difinita persono. Adoltulo distingas la lingvojn, bone scias, ke temas pri du sistemoj. Sed por la infano ekzistas nur unu sistemo: la adoltulo. Por infano lingvoj kiel sistemoj, sendependaj de difinita persono, ankoraŭ ne ekzistas.

Ne miru, se infano aŭdanta lingvomiksaĵon emas miksi la lingvojn – ĉar fakte li miksas nenion. Li miksas nur el la vidpunkto de la adoltulo. El la propra vidpunkto li konsekvence restas en la sama sistemo, perfekte alproprigas la komunikadon kun difinita persono. Sed la tiel alproprigita lingvomiksaĵo el socia vidpunkto ne estas valora. Simple temas pri misfunkcio de la socio: ĝi prezentis malbonan modelon por la infano. La demando estas jena: kiel ni estu bonaj modeloj?

Jen *la fundamenta regulo:* unu persono – unu lingvo. Tiel la lingvoj ne povas miksiĝi, ja ĉiu normala infano distingas la personojn ĉirkaŭ si.

Kiom da lingvoj infano povas paralele alproprigi? La limo estas tute vulgara, praktika. Ja intense okupiĝi je infano povas nur kelkaj personoj, ne iom ajn. Malfacile oni povas imagi, ke multaj personoj eduku samtempe la infanon, tiel, ke ĉiu el ili ĉiutage intense komunikiĝu kun li. Kutime temas pri du personoj, malofte pri tri, tre malofte pri kvar. Certe oni povas aranĝi la edukadon tiel, ke estu eĉ pli ol kvar, sed ĉ. dek jam estas pura fantaziaĵo. Kaj la nombro de la personoj limigas la nombron de la paralele alproprigeblaj lingvoj. Do, infano certe povas alproprigi kelkajn lingvojn, sed ne multajn. Precize kiom? Tion verŝajne ni neniam ekscios. Kapacito de la menso el praktika vidpunkto estas senlima.

Kiun *metodon* oni devas uzi por la plurlingva edukado? Neniun specialan. Ja temas pri simpla komunikado, ĉiam, konsekvence en la sama lingvo, tute tiel, kiel niaj miloj da prauloj faris ekde la eks-prahomiĝo. Difinita persono devas persisti je difinita lingvo kaj neniam ŝanĝi la lingvon en la komunikado kun la infano. Ŝanĝado de lingvoj konfuzas infanon, eventuale kaŭzas grandajn problemojn.



Kiujn lingvojn oni elektu? Se temas pri diverslingvaj gepatroj, la plej evidenta elekto estas: ĉiu sian lingvon. Sed se almenaŭ unu el ili estas ankaŭ esperantlingvulo, la afero estas pli komplika, kaj por trovi la ĝustan konfiguracion oni devas konsideri ankaŭ la medion. Kial?

El la vidpunkto de plurlingva eduko *la medio* funkcias kiel tria persono, kiu ankaŭ en la lingva edukado iom post iom transprenas la komence ekskluzivan rolon de la gepatroj. Superflue estas transdoni tiun

lingvon en la hejmo, kiun lingvon la infano sen interveno de la gepatroj perfekte alproprigos (eĉ eventuale kontraŭ la volo de la gepatroj): tiun de la medio, de la antaŭlernejo, lernejo, ktp. Se unu el la gepatroj elektas la lingvon de la medio, tio signifas, ke ili rezignas je unu lingvo, ili transdonos al sia infano unu lingvon malpli, ol ili povus. Oni devas serĉi la plej ekonomian solvon, do, la konkludo estas evidenta. Se la lingvo de la medio identas kun la lingvo de unu el la gepatroj, anstataŭ tiu lingvo oni uzu Esperanton.

Se la gepatroj vivas en medio, kies lingvo estas fremda por ambaŭ, la afero estas tute alia. La infano prefere alproprigu ambaŭ gepatrajn plus la median lingvon. Kial? Ĉar poste, kiam li lernos lingvojn en la kutima senco de la vorto, pli facile li lernos Esperanton, ol iun ajn etnan lingvon. Do, ekonomie estas rezigni pri Esperanto kiel denaska lingvo de la infano. Se la medio-lingvo identas nek unu, nek la alian el la gepatraj lingvoj, uzo de Esperanto estas malkonsilenda.

Sed kio je tiuj gepatroj, kies hejma lingvo estas Esperanto, ĉar ili reciproke ne komprenas la lingvon de la alia? La reguloj estas la samaj, ĉar estas unu afero komunikado kun la infano kaj estas tute alia afero komunikado de gepatroj aŭ de aliaj personoj inter si, sen aŭ en la ĉeeesto de la infano. Bebo ekde sia naskiĝo tute klare distingas tiujn du aferojn. En la lasta kazo la infano atentas, iom post iom alproprigas ankaŭ tiun lingvon, precipe se li estas enirata en la konversacion, iĝas ĝia partoprenanto. Sed li ĉiam tre klare perceptas, ke tio ne estas komunikado kun difinita persono, sed interna komunikado de plurpersona grupo, de societo, kiun li partoprenas. Ili estas du diversaj (signo- kaj interpersonaj) sistemoj. Kaj ĉar lingvo kiel apartaĵo por la infano ne ekzistas, la lingvoj de la du sistemoj neniel miksiĝas en lia menso. Tial esperantistaj gepatroj en fremda medio facile povas transdoni al la infano tri lingvojn (al kiu aldoniĝos ankoraŭ la lingvo de la medio). Tial ne kaŭzas problemon por infano ekz. tiu kutimo, ke la familio lingve ĉiam adaptiĝas al la lingvo de la gasto.

Erare oni priskribas tiujn aferojn kiel lingvouzon en diversaj situacioj. Ja povas esti, ke temas pri la *sama situacio,* nur la personoj (kaj la lingvo) ne estas la samaj. La diferenco, kiu determinas la lingvoalproprigon, estas la diferenco de la personoj partoprenantaj la komunikadon.

Ekzistas esceptoj, kiam malgraŭ ŝanĝado de lingvoj, malgraŭ lingvomiksado, malgraŭ spekulaciaj lingvaj eksperimentadoj de la gepatroj la infano restas normala, kaj kreskante eĉ korektas la erarojn kaj ekscesojn de siaj gepatroj. Ja infano denaske estas multe pli inteligenta, ol siaj gepatroj, kies kapo jam estas plenŝtopita de (ankaŭ) lingvaj antaŭjuĝoj. La respondecon tamen havas la gepatroj.

RÁTKAI Árpád
H-6721 Szeged
Lengyel u. 4.

Lernplifaciligo pro antaŭmetitaj lingvokursoj

Prof.Dr. Helmar FRANK, Paderborn & Dr. Vera Barandovska, Ostrava

1. Teorio de lernplifaciligo pro lingvoinstruado (Frank)

La kresko de la lernkurbo (de la atingita procenta kompetenco kiel funkcio de lerntempo) estas karakterizata pere de parametro, kiun oni povas nomi „lernfacileco". Ĝi estas malrekte proporcia al la informenhavo de la instrumaterialo kaj proporcia al la lernrapideco de la lernanto. La faktoro de la proporcieco „efikanco" montras la procentan parton de la lernfacileco, kiu estas uzata dum la lernprocedo por la instrumaterialo (komparu ekz. Frank,1977,1982.) Oni povas supozi, ke la (aĝdependa) lernrapideco ne estas influebla per pedagogiaj aŭ psikologiaj rimedoj. Tiam povas lernplifaciligo esti influata de antaŭmetita pedagogia aŭ psikologia aranĝo simple pro malpligrandigo de la instrumateriala informo aŭ pro pligrandigo de la efikanco aŭ per ambaŭ vojoj samtempe. Tio, kion oni normale nomas „transfero", estas klarigebla klerig- kibernetike kiel malpligrandigo de la (subjektiva) instrumateriala informo pro antaŭa rivelado de struktura redundanco. La pligrandigo de la kresko de la lernkurbo, do la „lernfacileco" pro antaŭa „motivigo" estas evidenta kiel plialtigo de la subjektiva parto de la efikanco: la interesigita lernanto koncentrigas sian atentemon pli al la instrumaterialo, estas malpli flankenigata per paralelaj informproponoj. Pro „motivigo" estas do ŝanĝebla la efikanco, pro „transfero" la lernmateriala informo, kaj nur helpe de ŝanĝo de ambaŭ tiuj (ĉi tie komprenata en la „normala", ne plu precizigita vortsenco) parametroj estas la lernfacileco kaj tiel la vojo de la lernkurbo pedagogie-psikologie influebla.


El tio ne póvas logike sekvi, ke krom „transfero" kaj „motivigo" ne ekzistas alia pedagogia-psikologia plibonigebleco de la lernprogreso. La efikanco ne estas plialtigata nur per tio, ke la lernanto interesiĝas pri la instrumaterialo, koncentriĝas pli forte al ĝi, kaj tiel aktive (aŭtonome) plialtigas la probablecon, ke la aperceptitaj instrumaterialaj elementoj estas lernataj, je la kosto de la lernprobableco de nerelevanta informo.

Tiu ĉi ŝovo de la lernprobableco favore al la relevantaj elementoj de la apercepto povas esti influata ankaŭ de ekstere, tiel ke la lernanto pli bone uzas la nerelevantaĵon por reliefigi la relevantaĵon, li do plibonigas sian lernomanieron. Sed ĉu ekzistas alia ebleco plifaciligi la sekvantan lernadon krom pere de „motivigo" aŭ „transfero", sen ŝanĝo de la influgrando funkcianta en instruado, do pere de ŝanĝo de la lernanto jam dum antaŭmetita pedagogia aranĝo? La sekva penseksperimento respondigas nin jese.

La instrumaterialo L estu precize egale (ekz. per video-kurso) alirigita al tri grupoj de lernantoj, kiuj diferencas kaj en lernrapideco kaj en la antaŭscio de L. La grupo A plene regas la instrulingvon (kaj la ĝeneralan kaj la faklingvan parton), la grupo B nur parte (ekz. ne la fakterminojn relevantajn por L), la

grupo C tute ne. La grupo C montros dum la instruado pri L nenian aŭ nur (nome kiam la instrumateriala informo estas parte ankaŭ eksterlingve ekz. kodita per bildoj) tre malgrandan lernprogreson, tio signifas, ke ĝia lernokurbo kreskos ege malrapide. Sed ankaŭ ĉe la grupo B estos la lernfacileco malpli granda ol ĉe la grupo A, pro komprenomanko de uzitaj fakesprimoj. Se ni nun antaŭmetas al la fakinstruado ĝenerallingvan aŭ faklingvan kurson, tiu-ĉi povas kaŭzi, ke la grupo C estos suprenigita al la instrulingva nivelo de la grupo B kaj la grupo B al nivelo de la grupo A. La lingva antaŭkurso do kaŭzas lernplifaciligon, ĝenerale sen tio, ke la lingvaj lernelementoj en normala senco kaŭzu „transferon" al la faka instrumaterialo L, do sen malpligrandigo de la subjektiva instrumateriala informo. Dume ne decidantas la fakto, ke la lingva informfluo ĝenerale malgrandiĝas dum la instruado (ĉar kun la lingvolernado estas ligita probableclernado pri la lingvoelementoj). Pli granda decidfaktoro estas tio, ke sen (kompleta) kono de la lingvokodo okazas dum la instruado neniu (kompleta) transdono de la semantika informo pri L, sekve povas esti uzata neniu (kontentige granda) parto de la lernkapablo por lerni la instrumaterialon, la efikanco do estas nula (aŭ relative malgranda).

Sendepende de la diversaj kaŭzoj de lernplifaciligo pro antaŭmetitaj aranĝoj („transfera" efektivigo, „motivigo" aŭ perado de la — ĉefe lingva — kodo uzota en la instruado) validas jeno: La tempo, kiu estas bezonata por la menciitaj antaŭmetitaj aranĝoj, povas esti pli mallonga ol la tempoŝparo kaŭzita per ili. Klerigekonomie do povas esti sencoplene fortranĉi la komencan parton de



la disponigita instrutempo ekz. favore al la lingva antaŭkurso, por poste akiri en la fakkampo L dum la tuta disponigita tempo pli bonan finrezulton (aŭ akiri la ĝisnunan rezulton pli frue). Tio pruviĝis edukpraktike en specimenaj studoj kun la instrulingvoj ILo kaj Germana, pri la instrukampoj klerigkibernetiko, interlingvistiko kaj merkatekonomiko por lernantoj el la hispana, ĉeĥa, slovaka kaj germana lingvoregionoj.

2. Spertoj pri la efiko de antaŭmetitaj ĝeneral- kaj faklingvaj kursoj (Barandovská)

2.1 Efiko de enkonduka ILo-kurso por hispanlingvanoj

En aprilo 1991 ni celis prezenti al studentoj de du mez-amerikaj universitatoj (Universidad Autónoma de Santa Ana en El Salvador kaj Universidad Rafael Landívar en Guatemala) po unu enkondukan **kurson** en kibernetikan pedagogion (Frank) kaj interlingvistikon (Barandovská). Ĉar ni en ambaŭ kazoj ne havis je dispono tradukistojn kaj ni mem ne sufiĉe bone regas la hispanan, ni decidis eksperimente antaŭmeti ILo-lingvokurson laŭ la rekta metodo kaj poste prezenti niajn fakkursojn en ILo. En Santa Ana ni bedaŭrinde havis je dispono nur limigitan tempokvanton, entute ok instruhorojn. Neniu el la kvindeko de ĉeestantoj, kiuj estis studentoj de medicino, havis aŭ lingvan aŭ fakan antaŭkonon de la prezentota instruaĵo. Ili do ĉiuj apartenis al la menciita C-grupo, kiu post la sephora lingva antaŭkurso povis ekesti B-grupo, montronta ioman komprenemon de faka prelego. La studentoj fakte plejparte montris komprenemon. Tio ja pravigus la preparon, sed pro la tempomanko ne estis eble atingi pli grandan, konvinkigan rezulton, Ĉar la proporcio inter la necesa prepartempo kaj la instrutempo estis ekstreme malfavora.

La dua grupo de hispane parolantaj studentoj (Universitato Landivar en Guatemala) ebligis multe pli konvenan eksperimenton. Ili ne havis antaŭkonojn de la instrulingvo, sed temis pri ĉ. 30 progresintaj studentoj de informadiko, psikologio kaj lingvistiko,ĉe kiuj oni povis supozi (krom pli alta motiviteco) la konon de la faka terminologio; oni do povas klasifiki ilin ĉu kiel B-grupanojn ĉu nur kiel C-grupanojn por kiuj tamen la instruaĵinformacio estis reduktita — ambaŭkaze prepara lingvokurso, denove laŭ la rekta metodo, antaŭvideble povis pli bone taŭgi, des pli ĉar 9 horoj anstataŭ nur 7 estis je dispono por ĝi. Fakte tiu lingva preparo montriĝis sufiĉa: la aŭskultantoj kapablis sekvi la postajn (alternativajn), po 6-horajn fakkursojn, kiujn ili pro sia specialiĝo komprenis. Tion ili sufiĉe konvinke pruvis, solvante facilajn taskojn aŭ respondante (hispanlingve aŭ anglalingve) al la kontroldemandoj. La pasiva kono de la preleglingvo do sufiĉis. Tio ŝuldiĝas certe ankaŭ al la intereso pri la temo (motiviteco), kaj al la lingvistika fakto, ke la gepatra hispana lingvo de la studentoj (en ambaŭ universitatoj) enhavas multajn latinidajn radikojn, kiuj konformas al ILo-radikoj kaj tial kaŭzas transferon.

Kompreneble ni prelegis en ambaŭ universitatoj malrapide, kun klara artikulacio kaj nekomplikita frazaro. Tamen, sen la prepara ligvokurso ni ne po-

vus esti similbone komprenitaj. La rezulto de instruado almenaŭ en Landivar Universitato do plene pravigis la antaŭmetadon de lingovkurso, kiu daŭru por fake progresintaj kaj interesitaj hispanlingvanoj almenaŭ 9 horojn.

2.2 Efiko de enkonduka ILo-kurso por germanlingvanoj

En Teknika Universitato Berlino Frank disdividis en la somera semestro 1991 sian komunikadsciencan kurson por germanlingvanoj en 6-horan ILo-kurson prezentitan laŭ la rekta metodo kaj sekvantajn prelegojn en ILo cele enkondukon en komputillingvistikon, interlingvistikon kaj kibernetikan lingvopedagogion. Temis pri la kvara (fina) kurso de ripete ofertita komunikadscienca kursserio (Klerig- kaj Lingvokibernetiko), tiel ke - same kiel en Landivar Universitato - la studentoj havis kaj fakajn antaŭkonojn kaj intereson. Montriĝis, ke subaze de la prepara kurso la studentoj ja kontentige komprenis la postan enkondukan prezentadon de komputillingvistiko, sed malpli bone la enkondukon en la interlingvistikon; nur unu studento – la plej bona ILo-lerninto – povis je la kursfino kontentige sekvi ankaŭ la prelegon enkondukan en la kibernetikan lingvopedagogion. Tiuj diferencoj kaj la diferenco al la rezulto de la eksperimento en Gvatemalo klariĝas pro (1) la diversampleksa eluzo de ILo necesa por enkonduke prelegi pri la tri temoj, (2) el la redukto de la „ILo-kurso por sciencistoj" de 9 (Gvatemalo) al 6 horoj (Berlino) kaj (3) pro lingvistika kaŭzo: la diferenco inter la radikaroj de la germana lingvo kaj de ILo estas multe pli granda ol inter tiuj de la hispana kaj de ILo. (Por pli zorgeme planendaj kaj kontrolendaj eksperimentoj ni rekomendas por progresintaj studentoj antaŭvidi en la germana lingvoregiono 15 horojn, en la hispana 9 – por komencantoj po 33% pli, do 20 respektive 12 studhorojn.)

2.3. Efiko de enkondukaj kaj fakaj kursoj pri ILo kaj la Germana por parolantoj de la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj

En marto 1991 estis organizita de la germana klerigejo InBIT kune kun la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en Orienta Berlino instruseminario – plejparte en la germana, parte en ILo – pri merkatekonomiko por ĉeĥe kaj slovake parolantaj fakuloj. Konsiderante la lingvajn kaj faklingvajn antaŭkonojn la partoprenintoj povas esti klasifikataj kiel B-grupanoj – parte eĉ nur kiel C-grupanoj. Ĉar kvankam ili estis ekonomikistoj, la problemaro de merkatekonomiko ne ekzistis en Ĉeĥoslovakio kaj ĉiuj do ne povis koni la koncernan terminologion. Tre utila montriĝis la komputila fakvortaro preparita speciale por tiuj-ĉi kursoj; ĝi enhavas la fakterminojn en la Angla, Germana, ILo kaj Ĉeĥa – kaj krome la difinojn de la instruataj terminoj. Tiu ĉi faklingva preparkurso estis seshora kun la posta ebleco individue, helpe de komputiloj, ripeti kaj plulerni la bezonatajn vortojn. Tiu-ĉi preparo montriĝis tute sufiĉa por komprenigi la fakajn prelegojn en la Germana al ĉiuj partoprenintoj – kaj en ILo al tiuj kun sufiĉaj konoj de ILo. Ĉiuj partoprenantoj havis la necesajn antaŭkonojn de la (ne-faka) Germana, preparkursoj ne estis necesaj. Parto de la studentoj ne havis sufiĉajn ILo-antaŭkonojn. La intensaj kursoj por tiu-ĉi grupo estis organizitaj parte – por ĉeĥoj – jam antaŭe, en la fondata Silesia Universitato Opavo (CS), en du semajnfinaj periodoj (entute 20 studhoroj) kaj parte – speciale por slovakoj - dum la Berlina seminario mem (6 horoj). Ankaŭ tiu-ĉi preparo estis plejparte efika kaj la plejmulto de la aŭskultantoj ne havis problemojn sekvi la fakan prelegaron en ILo. La rezulta kompreno estis kaŭzita ĉefe pro la antaŭkonoj de la faklingva problemaro, akirita dum la faka preparkurso. Krome ekzistis la kontrolebleco demandi detalan klarigon en la Germana, kiun kelkaj partoprenantoj ankaŭ uzis. Kaj la lingva kaj la faklingva preparaj kursoj pruviĝis en tiu-ĉi kazo esti tre utilaj.

Literaturo:

Frank, H.: Grundlagen und sprachpädagogische Anwendung einer informationstheoretischen Transferanalyse. GrKG 19/3, 1978, 75-88.

Frank, H.: Kibernetike-pedagogia teorio de la lingvo-orientiga instruado. En: Frank/Yaashovardhan/Frank-Böhringer (eld.): Lingvo-Kibernetiko/Sprachkybernetik. Narr, Tübingen, 1982, 123-144, 183-184.

Stipendio Ivo Lapenna

Memore al Prof. D-ro Ivo Lapenna (1909–1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo ĝenerale kaj ties aplikado en la scienco speciale, „Fondaĵo Ivo Lapenna" starigis **Stipendion „Ivo Lapenna"**.

La Stipendio konsistas el subvenciado al kiel eble plej multaj **disertacioj je univesitata nivelo** (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de L.L.Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

La unuan fojon la Stipendio estos aljuĝita en 1992 por **disertacioj oficiale akceptitaj** de universitata instanco en la jaroj 1990 kaj 1991. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio bv. peti la **detalan regularon** de la sekretario-kasisto de Fondaĵo Ivo Lapenna, s-ro Peter Zacho, Nĉrregårdsvej 91, DK-2610 Rĉdovre, Danlando. **Tempolimo** por la transsendo de la faklaboraĵo en du ekzempleroj estas fino de februaro 1992. Adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio

UNIVERSITATANOJ! NUN REAGU!

Jam dissendiĝis vaste en la mondon la enketilo pri universitat-nivela instruado. Tion subtenas ILEI, kiu urĝe alvokas ĉiun koncernaton resendi freŝajn informojn al s-ro Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 2l, B-8400 Oostende, Belgio ĝis plejlaste la **15a de aprilo** – pli frue se eble. Kiu ne ricevis enketilon sed scias pri kurso, petu ekzempleron tuj.

Informojn pri novaj disertacioj aŭ malnovaj ne raportitaj en la verko de s-ro Symoens, sendu al li (adreso kovrile) por kompletiga eldono.

Miroslav Malovec, Ĉeĥoslovakio

KIEL KOMUNIKOS LA U NUIGITA EŬROPO?

Franca instruisto Michel Feuchot proponis al Eŭropo interesan ideon: por unuigi la naciojn de nia malnova kontinento, neceses komenci ĉe la infanoj, por ke la estontaj civitanoj, politikistoj, teknikistoj, sciencistoj kaj entreprenistoj kutimiĝu jam de la lerneja aĝo trakti la eŭropajn aferojn komune kaj por la komuna utilo.

En 1987 li fondis en la franca urbeto Bèze apud Dijon la Societon de la Infanoj de Eŭropo, kies prezidanto li fariĝis kaj kiu ĝuas subtenon de la franca ministerio por edukado kaj favoron de la Eŭropa Parlamento. Efektiviĝis internaciaj renkontiĝoj de la eŭropaj infanoj en Strasburgo, en Bèze kaj junie 1991 okazis la tria renkontiĝo en la ĉeĥoslovaka foirurbo Brno.

Al Brno venis pli ol 500 geknaboj el 12 landoj; dum la solena inaŭguro ĉe la urbestro estis proklamita kaj aprobita Deklaracio de la Rajtoj de Eŭropa Lernejano; la kulturan programon, preparitan de la infanoj niem, salutis en la operteatro Janaĉek du ĉeĥoslovakaj ministroj, kaj elsendis ĝin vive la ĉeĥoslovaka televido; en la plej granda stadiono de Brno okazis infanaj olimpikoj, kaj kelkajn infanojn invitis la franca grupo por viziti Francion; la invititoj travivis belan semajnon kaj estis akceptitaj ankaŭ ĉe la Eŭropa Parlamento malgraŭ la jugoslava krizo.

La plej grava afero dum la renkontiĝo estis proklamo de la jam menciita Deklaracio, kiu aljuĝas al la eŭropaj lernejanoj ne nur la rajton je deviga kaj senpaga lerneja edukado, sed ankaŭ je lernado de fremdaj lingvoj kaj je libera vizitado de ĉiuj eŭropaj landoj (individue aŭ kun la klaso), por ke la kunfratiĝado de la popoloj komenciĝu jam en la plej juna generacio.

La oficiala lingvo de la Societo estas la franca, sed la infanoj povis utiligi ankaŭ aliajn lingvojn: sur la ĉemizo ili havis karteton kun sia nomo kaj kun lingvoj, kiujn ili parolas.

Esperanto aperis nur ĉe unu ĉeĥa knabino (kelkajn Esperantajn vortojn diris al ŝi nur la prezidanto M. Feuchot mem) kaj tio estis domaĝo, ĉar el ĉiuj internaciaj lingvoj plej ofte estis uzata la pantomimo. Esperanto povus helpi ĉe tiaj renkontiĝoj, kaj ĉar la agado de la Societo kaj eble ankaŭ de aliaj similaj iniciatoj en la futuro kreskos, estas grave por nia movado, ke Esperanto ne estu eliminata. Sed estus eraro petegi, ke oni apliku ankaŭ la internacian lingvon kaj subtenu ĝin — male nia movado devas helpi propagandi similajn tuteŭropajn ideojn kaj iniciatojn, ne peti helpon de Unesko, sed mem helpi al Unesko, ne peti helpon de la Societo de la Infanoj de Eŭropo, sed mem helpi al la Societo, ne peti helpon de la Eŭropa Parlamento, sed mem helpi ĝin — jen la plej efika vojo, kiel penetri en la konscion de eŭropanoj.

daŭrigo sur p. 18

Deklarecio de Rajtoj de Eŭropa Lernejano

akceptita en Brno la 21-an de junio 1991
(Communauté des Loupiots d'Europe)

Eŭropo fratema kaj amikema estos konstituita pli facile, se ĝiaj estontaj politikistoj agos komune, sciencistoj esploros komune, entreprenistoj entreprenos komune kaj civitanoj komune interkonsiliĝos jam de la lerneja ago.

1. La titolon *Eŭropa lernejano* povas akiri ĉiu infano el la landoj de la Eŭropa Komunumo ekde la unua klaso ĝis la fino de la elementa lernejo (maksimume ĝis 16 jaroj).

2. Por *Eŭropa lernejano* validas ĉiuj rajtoj difinitaj en la deklaracio — sen limigo de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo,religio , deveno ktp.

3. *Eŭropa lernejano* havas la rajton je edukiĝo — senpaga kaj deviga, kiu kontribuas je lia/ŝia kulturo, je disvolvo de liaj kvalitoj, de persona juĝkapablo, je morala kaj sociala respondeco fariĝi utila membro de la Eŭropa Komunumo.

4. *Eŭropa lernejano* havas la rajton je Eŭropa civitana edukiĝo, kiu pravigas lian membrecon en la Societo, permesas al li rekoni individuecon kaj respekti diferencojn, plibonigadi reciprokajn kontaktojn, en kiuj lingvo ne rolos kiel nevenkebla baro.

5. La rajtoj de *Eŭropa lernejano* efektiviĝos

a) se la infanoj dum lerneja instruado lernos unu aŭ eĉ plurajn eŭropajn oficialajn lingvojn

b) se ili komunikos per korespondado aŭ per liberaj interŝanĝoj de lernantoj

c) se *Eŭropa lernejano* povos sola aŭ kun sia klaso libere moviĝi en ĉiuj landoj–membroj de la Eŭropa Komunumo. La libereco de moviĝo permesos al li plibonigi siajn sciojn lingvajn, kulturajn, sciencajn kaj teknikajn...

ĉ) *Eŭropa lernejano* lernos libere, respondece, iniciateme, komune li serĉos solvon de problemoj, realigos tion, kio lin koncernos.

Necesas krei por la lernantoj kaj por la mondo, por kiu ili estas preparataj, novajn kondiĉojn en la materia, intelekta kej amoplena medio. Disvolvi amikajn rilatojn inter lernejoj, klasoj kaj lernantoj.

d) *Eŭropa lernejano* rajtas posedi la titolon 'Eŭropa lernejano' kaj lia lernejo la titolon 'Eŭropa lernejo'. (traduko pere de la ĝeĥa traduko)

KOMUNIKADO en la EŬROPA KOMUNUMO 1992: Kvindek paĝa raporto, agad-plano kaj fonto de bazaj argumentoj por la projekto de UEA/ILEI/EEU. Kunverkis s-ro E. Symoens. Mendu de UEA. Recenzo sekvos en la venonta IPR. Kunlaborantoj en la projekto serĉataj!

Plenumi la taskon povas precipe la instruantoj de Esperanto, kaj la profesiaj, kaj la amatoraj. Ankoraŭ ne venis la tempo, kiam oni povos instrui Esperanton kiel la ĉefan fremdan lingvon (precipe pro kontraŭstaro de la gepatroj), sed jam nun necesas konvinkadi pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (Helmar Frank: Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo) kaj demonstri ĝin dum similaj internaciaj renkontiĝoj de infanoj, kia okazis en Brno. Ne estas necese instrui al la lernantoj la tutan Esperanton, por kio la supozataj 80 aŭ maksimume 160 lernhoroj ne sufiĉas, sed oni instruu nur la fundamentojn kiel la lingvo-orientitan instruadon, sur kiu povus baziĝi pli facila instruado de la angla, franca, germana kaj de aliaj lingvoj. La lingvoprovizo samtempe povus celi la praktikon, la konkretajn situaciojn, kiuj okazas dum la internaciaj geknabaj renkontiĝoj. Ne estas necesaj multaj vortoj nek komplikaj frazoj. Saĝe elektitaj vortoj povas esti malmultaj por facile superi la pantomiman gestadon, kiun ni vidis dum la renkontiĝo. Gravas nur, ke la vortoj estu pli malpli samaj en ĉiuj infankursoj en la tuta Eŭropo (pli bone en la tuta mondo), ke la lernolibroj ne prezentu tro multe da teorio. Ni bezonus internacian lernolibron kun la titolo „Lingvo-orientiga instruado surbaze de la Internacia Lingvo" kaj disvastigi ĝin al ĉiuj landoj. Ĉu sufiĉus adapti iun el la jam ekzistantaj lernolibroj aŭ ĉu necesus verki novan, mi ne scias.

Miroslav MALOVEC
Charkovska 7/10, CS-625 00 BRNO.

Konkurso por vid-benda instru-teksto

La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago organizas konkurson por verkemaj esperantistoj. Ĝia celo estas verki tekston, internacie uzebla por 3-hora vid-bendo kun 12 scenoj po 15 minutoj. Ĝi estu ankaŭ uzebla por televidelsendoj. La teksto:

1) estu taŭga por instruo al homoj en aĝo inter 18 kaj 30 jaroj.
2) prezentu scenojn pri nia Esperanta vivo, ekz. pri kongresoj, ferioj, E-familioj, lingvaj problemoj (ekz. inter diverslandaj najbaroj), en leĝera etoso.
3) estu en formo de dialogo inter la prezentantaj aktoroj.

La teksto estu ne nur *instrua* laŭ lingva vidpunkto, sed ankaŭ kaj precipe *edukinforma*, instrua **ne** laŭ tradicia maniero, sed laŭ **rekta** metodo, prezentanta al la spektantoj la logikecon de la gramatiko, kun samtempa (simpla) strukturo de la lingvo kaj ebloj de rapida komunikado per ĝi en aktualaj, interesaj, ofte spritaj situacioj, sen nepra studo de gramatikaj reguloj. Tiu parto estu limigita al la plej necesa por simplaj konversacioj, bazita sur *-as, -is, -os* kaj *-u* formoj, do sen participaj formoj. La serio do **ne estu kompleta lingvo-kurso**, sed pli **varb**-informa. La aŭtoro(j), kies verko(j)n oni elektas por filmi, ricevos monpremion, antaŭvideble en valoro de 300 ĝis 800 guldenoj.

Kontribuaĵojn oni sendu antaŭ la fino de 1992 al: Internaica Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

26a INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Domo de Konstruistoj, Bratislavo, Slovakio
1 – 7 aŭgusto 1992



KOMENIO – PIONIRO DE LA PEDAGOGIO

Konferenca kadrotemo : "Methodus linguarum novissima"

Tio estas la latina titolo de epokfara verko de la famega ĉeĥ-morava filozofo, teologo kaj pedagogo Jan Amos Komenský (latine: Comenius, esperante: Komenio), kiu naskiĝis en 1592 (sekve antaŭ precize kvarcent jaroj) en la sudmoravia urbeto Nivnice. Dum la konferenco kelkaj referantoj skizos la vivon, verkojn kaj pionirajn teoriojn de Komenio, multaj el kiuj restas validaj principoj de la nuntempa pedagogio. Tiuj referantoj estos ne nur ĉeĥoj kaj slovakoj – Komenio estis frua eŭropisto, li flue parolis latine kaj verkis tiulingve; li vivis en pluraj landoj kaj fine mortis en Amsterdamo en 1670.

Kaj niaj konferencaj laboroj ne limiĝos al la pasinteco. Analoge kun la avangardeco de la ideoj de Komenio, kiuj abrupte kontrastis kun la tiutempa eduka praktiko, ni serĉos kaj diskutos la novajn teoriojn, praktikojn kaj helpilojn, kiuj nuntempe avangardas en la fremdlingva instruado, kaj kiuj povus revoluciigi la instruadon de Esperanto. Tion ni esploros ne nur per prelegoj, sed ankaŭ per diskutrondoj kaj forumoj.

Kadrotemo Esperante: La plej novaj metodoj de la lingvo-instruado.

Bratislavo — la urbo:

La urbo Bratislavo ricevis en 1986 la epiteton 'urbo de la paco' pro diversaj pac-traktatoj subskribitaj tie, en 1271 inter Bohemio kaj Hungario, en 1626 inter Transilvanio kaj Aŭstrio kaj en 1805 inter Francio kaj Aŭstrio. En la nuntempo la urbo vivigos por vi la kurantajn (r)evoluciajn transformojn de la post-socialisma centra Eŭropo. La urbo, ĉefurbo de Slovakio, havas loĝantaron de 450 000, kun monteta situo flanke de Danubo. Ĝi estas atingebla trajne en ses horoj de Prago kaj en iom pli ol unu el Vieno. Ni organizos grupan vojaĝon el la UK en la posttagmezo de sabato la 1-a de aŭgusto 1992.

La konferencejo:

La domo de Konstruistoj estas moderna bone ekipita tri-etaĝa konstruaĵo kun liftoj (kaj memevidente, bone konstruita!). Ĝi havas ĉiujn necesajn faciligojn sub unu tegmento: memserva restoracio, kunven-salonoj kun projekciiloj, televidiloj ks., kaj loĝigo en du-personaj ĉambroj, ĉiu kun propra duŝo kaj necesejo. Reprezentanto de ILEI vizitis la urbon kaj la ejon. Ĝi havas 120 lokojn, sed momente nur 80 estas je nia dispono, do frua aliĝado konsilindas. La ejo troviĝas sur monteto-flanko, ne en la urbocentro; trole-busoj trafikas apude.

Loka Konferenca Komitato:

Tion plenumas la Slovakia Esperanto-Asocio, Sobotske nám 6, CS-058 01 Poprad; tel. (42-92) 235 39. Membroj de LKK estas: Prez.: Inĝ. Milan Zvara, Poprad. Sekr.: Anton Zachariáš. Vic-sekr: D-ro Slanislaw Košecký, Bratislavo, Financo: Inĝ. Olga Kičová: Programo: d-rino Vera Barandovská, s-roj Miroslav Malovec, E. Tvarožek, E. Geleta. Flanke de ILEI prizorgas la fakan programon kaj la paralelan gimnazion s-ino BARCSAY Zsuzsa, Bem Rakpart 25 B, H-1011 Budapest, Hungario; tel. (36-1) 201-2342. Administradon prizorgas la kasisto, Bertil Andreasson; superrigardon la prezidanto de ILEI. Dezirantoj kontribui al la faka aŭ distra programo, bv. kontakti la menciitajn.

Kotizoj:

La kotizoj kovras loĝigon en du-lita ĉambro, tri manĝojn tage kaj la programon. Ekskurso pagendos surloke. Kiu nepre deziras unu-litan ĉambron bv. komuniki tion kaj aliĝu nun: ni informos pri la kondiĉoj kaj krompago poste.

Ĉar la aplikeblaj prezoj estos sciataj nur januare, la nunaj tarifoj estas garantiataj de ILEI nur **ĝis la 31a de marto 1992.** Post tiu dato povos validi pli altaj. Do, aliĝu frue; lokojn ni disponigos laŭ la alvenordo de pagitaj aligoj.

Ĉar ĉi tio estas la unua konferenco en reform-eŭropo de post Lodzo en 1987, kaj ne venos baldaŭ plia ebleco, ILEI decidis esceptokaze oferti aliĝadon laŭ tri kategorioj depende de loĝlando. Tio celas ebligi vastan partoprenon de instruistoj el Ĉeh-Slovakio kaj najbaraj landoj, kiuj ĝis nun ne povis partopreni konferencojn kaj estonte ne povos permesi al si tion. Do, al regulaj konferencantoj ni ofertas grandan okazon renkonti novajn kolegojn.

TARIFO A:	340 NLG.	1100 SEK.		
TARIFO B:	210 NLG.	650 SEK.	6000 HUF.	2800 CSK.
TARIFO C:	140 NLG.	450 SEK.	4300 HUF.	2100 CSK.

NLG = nederlandaj guldenoj. SEK = svedaj kronoj
HUF = hungaraj forintoj CSK = ĉeĥ-slovakaj kronoj.

TARIFO A: Por Okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio, Aŭstralazio.
TARIFO B: Por loĝantoj de ĉiuj regionoj aŭ landoj ne cetere menciitaj.
TARIFO C: Por loĝantoj de Ĉeh-Slovakio, Rumanio, Albanio, Estonio, Latvio, Litovio, Sovet-unio (aŭ tio, kio ĝi iĝos), Ĉinio kaj Afriko.

- Pagu en svedaj kronoj aŭ konvertebla valuto al: Kasisto de ILEI, Bertil Andreasson, Södra rörum pl. 455, S-242 94 Hörby; pĝk. 682117-7. aŭ:
- Pagu en nederlandaj guldenoj aŭ konvertebla valuto al: Universala Esperanto-Asocio, Nw Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, (pĝk. 378964) indikante 'Por interna konto **ilek-a,** por la 26a ILEI-konferenco.'
- Loĝantoj de Hungario aŭ reform-eŭropo povantaj antaŭpagi en hungaraj forintoj: Hungara ILEI-sekcio, Kovács Márta, Ady Endre u. 23-25 C, H-1221 Budapesto; tel. (1) 226-3602. Skribu petante enpagilon.
- Loĝantoj de Ĉeh-Slovakio aŭ reform-eŭropaj landoj povantaj antaŭpagi en ĉeĥ-slovakaj kronoj, pagu al SEA, Sobotske nám 6, CS-058 01 Poprad; tel. (092) 235 39. Petu de ili informojn pri pag-manieroj.
- Personoj, neniel povantaj antaŭpagi, plenskribu aliĝilon kaj sendu ĝin al la kasisto de ILEI. Se ĝi alvenos ĝis la 31a de marto 1992, validos la nuna tarifo, pagenda surloke en CSK, HUF aŭ valute. ILEI provos trovi apartajn aranĝojn kun sekcioj en serioze netranspagipovaj landoj; sed ne povas anticipe devigi sin akcepti pagojn en nekonverteblaj valutoj krom CSK/HUF.

Cseh-Seminario

Kadre de la konferenco, la Internacia Esperanto-Instituto (IEI), okazigos Ĉe-seminarion por estontaj Cseh-instruistoj. La partopreno estas aparte pagenda. Interesiĝantoj petu plenajn informojn de IEI, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando; tel. (31-70) 355-66-77; pĝk: 162626.

ILEI/UEA lingvo-ekzamenoj:

Tiuj estos ofertataj dum la UK en Vieno je elementa kaj meza niveloj, kaj povos esti ofertataj en Bratislavo se sufiĉaj kandidatoj estos. Kiu deziras kandidatiĝi, bv. skribi al la nova sekretario de IEK: s-ino Marie Hunninck, Centre Culturel 'La Charité', B.P. 136, F-84200 Carpentras, Francio. Por pli da informoj kaj specimenaj testoj ambaŭ-nivele, mendu la gvidlibreton de la Libroservo de UEA; prezo: 6,60 gld.

Gimnazio:

Paralele kun la konferenco okazos gimnazio por 20 junuloj (vidu apartan artikolon kaj aliĝilon). Por konferencanoj tio signifas la allogon de praktikaj demonstro-lecionoj, el kio povos fonti tre fruktodonaj kaj konkretaj diskutoj.

ALIĜILO AL LA 26a KONFERENCO DE ILEI

Bv. sendi la aliĝilon al: Bertil Andreasson, Södra rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio. Se vi pagos al Poprad aŭ Budapest, laŭeble sendi tien kopion.

Mi aliĝas al la 26a konferenco de ILEI en Bratislavo, 1–7 aŭgusto 1992.

Familia nomo: . . . . . Antaŭnomo: . . . . . .
Profesio:: . . . . . Sekso..... Naskiĝdato . . . . . .
Kompleta poŝta adreso: . . . . . .
. . . . . .
Dato: . . . . . Subskribo: . . . . . .

– –

Bonvolu krucsigni kaj substreki ĉe 'jes/ne:

☐ Mi mendas dulitan ĉambron kaj deziras loĝi kun _____, kiu ankaŭ aliĝas.

☐ Mi volas unu-litan ĉambron kaj petas informojn pri tio. Mi postpagos la plian koston.

Mi manĝos vegetare: jes / ne

Mi sekvas apartan dieton, nome: . . . . . .

☐ Mi partoprenos la Cseh-seminarion C kaj jam pagis al IEI
sed ne pagis al IEI

☐ Mi volas partopreni la ILEI-ekzamenon je nivelo elementa
meza

Aliaj deziroj: . . . . . .
. . . . . .

Mi pagas la kotizon al _____
en dato _____ je la sumo de _____
en valuto _____.

Mi partoprenos la UK en Vieno: jes/ne

Mi deziros veturi kune el Vieno al Bratislavo: jes/ne

Subskribo:_____ Dato: _____

– –

Spaco por administrado:

Aliĝilo alvenis je: _____ ĉe: _____

Aliĝnumero: _____

Pago alvenis je: _____ ĉe: _____

Sumo: _____ Plie pagenda: _____

Ĉambronumero: _____ Kun _____

IILEI LABORTABLE

Invito al la ILEI-GIMNAZIO

Karaj Gejunuloj 13–16-jaraj!

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitas vin partopreni INTERNACIAN SOMERAN GIMNAZIAN SEMAJNON (ILEI-GIMNAZION) de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1992 en Bratislava (Ĉeĥ-Slovakio).

En la gimnazia semajno vi povos

- *interamikiĝi* kun geknaboj el plej diversaj landoj de la mondo;
- ĝui kelkajn *interesajn*, ne-lernejecajn *studhorojn* (nur 30-minutajn!) pri E-lingvo, E-literaturo, matematiko, geografio, muziko, sporto kaj arto, *lernante kurioza ĵojn*;
- *ekskursi*, viziti vidindaĵojn de la regiono, ludi, amuziĝi kaj
- *mem proponi*, iniciati aŭ eĉ gvidi kelkajn programerojn.

Ankaŭ la *instruistaro* estos internacia:

- ges-roj R. kaj F-G. Rössler, Germanio (vi trovas iliajn kontribuaĵojn en *Juna Amiko*)
- s-ro S. MacGill, Novzelando/Hungario (verkinto de pluraj amuzaj skeĉkaj lernolibroj, redaktoro de *Juna Amiko* ktp.)
- s-ro P. Arnaudov, Bulgario (verkinto de *Amuza matematiko por gelernantoj)*
- s-ro P. Smid, Ĉeĥ-Slovakio (partoprenintoj de la Infana Kongreseto en Norvegio bone konas kaj ŝatas lin) kaj aliaj bonaj fakuloj.

Vi estas bonvena en la ILEI-Gimnazio, se

– vi havas aĝon de 13–16 jaroj (je la dato de la gimnazia semajno)
– vi bone parolas la lingvon Esperanto (kie ajn vi lernis aŭ lernas ĝin)
– vi volonte submetiĝas al la disciplino de la Gimnazio
– viaj gepatroj (aŭ iu socieo k.s.) entreprenas pagi la partoprenkotizon kaj la vojaĝon.

Tute *ne gravas*, kiuspecan lernejon vi vizitas en via lando, nek tio, kiujn juĝnotojn vi havas el la menciitaj fakoj.

Gravas, ke vi fartu bone en internacia socieo de samaĝuloj, krome ke vi volu fariĝi pli kaj pli klera kaj sperta, lernante en amuza formo en la Internacia Lingvo.

El inter la sendintoj de la aliĝilo ILEI elektos *ĉ. 20 geknabojn* por la gimnazia semajno.

Aliĝantoj bv. plenskribi la aliĝilon kaj ateston kaj sendu ambaŭ al la gimnazia direktorino (adreso supre): →

Kotizoj por la ILEI-Gimnazio estas:

Tarifo A	250 gld	800 SEK		
(Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko, Japanio, Aŭstralio + Oceanio)				
Tarifo B	2240 ĈSK	4480 HUF	150 gld	480 SEK
(Ĉiuj ceteraj landoj, aparte ne menciitaj)				
Tarifo C	1600 ĈSK	3200 HUF	110 gld	320 SEK
(por ĉeĥoj, slovakoj, rumanoj, albanoj, baltanoj, sovetianoj, ĉinoj, afrikanoj)				

Pri la *pagmaniero* ni informos tiujn, kies aliĝojn ILEI povos akcepti (la nombro estas limigita je 20!). La menciitaj sumoj inkludas loĝadon, manĝadon (3-foje tage) kaj la tutan programon kun ekskurso. Krome (ekster tiu sumo) estas la vojaĝkosto kaj iom da poŝmono. *Aliĝilon* bonvolu peti kaj *resendi ĝis la 31-a de marto* ĉe *S-ino BARCSAY Zsuzsa (prononcu: barĉai)*
Bem rakpart 25/B, H-1011 Budapest

ALIĜILO al la ILEI-GIMNAZIO (1-7 aŭg 1992, Bratislavo)

Familia nomo:..... Individua nomo: .....
Naskiĝdato: ..... Junulo/Junulino: .....
Kompleta adreso: .....
.....
..... Telefono:.....
Mi interesiĝas speciale pri:.....
Mi proponas por la Gimnazio programeron de .....
.....
Mi deziras/ne deziras vegetaran manĝon.
Mi havas malfacilaĵon je vido, moviĝo, sed kun helpo povas prizorgi min mem: .....
Mi volonte adaptiĝos al la normala disciplino de la Gimnazio.
Dato: ..... Subskribo: .....

ATESTO

flanke de la landa ILEI-sekcio, instruisto aŭ esperantistaj gepatroj:

- la lingvo-kono de la aliĝanta junul(in)o sufiĉas, por ke li/ŝi lernu diversajn fakojn en Esperanto dum la gimnazia semajno.
- Li/ŝi jam pruvis emon adaptiĝi al komunumo de samaĝuloj kaj al baza disciplino.
- Se li/ŝi estos akceptita fare de ILEI, pri li/ŝi respondecos dum la semajno kaj pri la revojaĝo la sekva persono, kiu samtempe kaj samloke estos ano de la 26a ILEI Konferenco: .....

Atestanto: Nomo: .....
Adreso: .....

Dato: ..... Subskribo: .....

Rilato inter atestanto kaj aliĝanto: .....

Instruado de Esperanto en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely (Hungario) en la studojaro 1991/92

En la altlernejo la instruado de la internacia lingvo ĉijare efektiviĝas kadre de tri edukformoj en kvin diversnivelaj grupoj.


En la unua kurso 26, en la dua 40 studentoj lernas E-on kiel unuan devige elekteblan fremdan lingvon. La instruado daŭras 4 semestrojn, finiĝas per ekzameno, kiun povas anstataŭi diplomo de kompleksa mezgrada ŝtata ekzameno.

Esperanton, kiel trian fakon studas 5 personoj. Ili povas komnenci siajn kvinsemestrajn studojn en la 5-a semestra, sukcesinte jam en la mezgrada lingvo-ekzameno. Dum la elformado ili havas lingvo-praktikajn ekzercojn, okupiĝas pri priskriba kaj praktika gramatiko, movadhistorio, interlingvistiko, literaturo, aparte pri porinfana literaturo kaj tre serioze pri metodologiaj demandoj teorie kaj praktike. La studentoj estos diplomiĝintaj instruistoj pri Esperanto. Tiuj 5 personoj pasintjare finis jam la unuajn du semestrojn.

La ĉi-jara novaĵo estas nia koresponda kurso, al kiu aliĝis sep personoj, plejparte jam praktikantaj instruistoj kiuj opinias necesa por sia ĝisnuna iom instinkta laboro ricevi fakan helpon, pli bone ekkoni la historion kaj la literaturon de nia movado, pritrakti la plej tiklajn gramatikajn kaj lingvajn demandojn. La grupo intencas formi iun metodikan metiejon kun utilaj spert-interŝanĝoj kaj celas kompili, inventi novajn instruhelpilojn kaj materialojn, fariĝi metodologia centro de la regiono.

La studobjektoj de tiu ĉi kurso kongruas kun tiuj de la taga fak-edukado, kvankam la kvanto de la studohoroj ne egalas, ja la kursanoj de la koresponda grupo jam havas instruistan praktikon, kio mankas ankoraŭ al la tagaj studentoj. La koresponda edukoformo daŭras 6 semestrojn, po semestre okazas 5 tuttagaj konsultiĝoj. Post la sukcesaj semestrofinaj ekzamenoj la studojn kronas ŝtata ekzameno, diplomiĝo pri esperantologiaj studoj.

Por ke la nivelo estu pli alta, ĉiusemestre ni intencas inviti eksteran preleganton, konatan fakulon de la tiama plej traktata studobjekto. Laŭplane unue venas Stefan MacGill por evoluigi la parolkapablon de la partoprenantoj, duasemestre Ilona Koutny prelegi pri gramatiko kaj pri komputilaj demandoj, Herbert Mayer el Vieno kaj István Értl estos invitataj por literaturaj prelegoj, Zsuzsa Barcsay por metodologio, Árpád Rátkai por movadhistorio, kaj Tazio Carlevaro el Svislando por interlingvistikaj demandoj.



Kompreneble ni volonte akceptus ankaŭ aliajn gastojn, sed bedaŭrinde niaj financaj ebloj estas limigitaj. Mem la kurso por la partoprenantoj kostas sufiĉe multe, ĉiusemestre 6.000 forintojn (duon-

monata salajro) plus krome vojaĝkostojn. Ni ĝojas, ke la laborlokoj almenaŭ ne malhelpas ilian studadon, sed financajn helpojn atendi estus jam tro. Ni revas ricevi iom da monhelpo de iu fonduso eksterlanda, ja tiu edukoformo donos 7 novajn diplomitajn instruistojn al la movado, kiuj ekzemple ĉi-jare al pli ol cent infanoj oficiale instruas la internacian lingvon kaj laboras entuziasme por ĝia disvastigo.

La altlernejo ankaŭ sekvontjare (eblas, ke lastfoje) pretos lanĉi ankoraŭ unu korespondan kurson okaze de sufiĉe da intereso. La aliĝontoj havu diplomon pri mezgrada lingvoscio kaj instruistan, (aŭ esceptokaze alian supergradan) diplomon. Pri la aliaj kondiĉoj vidu la informojn en la baldaŭ aperonta informlibro pri la supergradaj stud-eblecoj.

Katalin SMIDÉLIUSZ. Szombathely, okt 1991

IPR, numeron 2/91, paĝon 27, enŝteliĝis en mian artikoleton preseraro. Bonvolu represi en la venonta numero ĝustigon. Temas pri la tria linio de la fino. Pro la konekso mi petas vin presi la du lastajn paragrafojn:

La rekta komplemento devas sekvi la transitivan verbon, kaj tiel antaŭi la esprimon de mezuro. Ekzemplo: "La plenkreskuloj kunprenis la infanojn po tri".

Izolite "po tri" ne donas iun signifon, sed ĉar mi konservis la rektan komplementon "la infanojn", mi ne bezonas skribi la kompletan mezuran esprimon, ĉar ni scias pri kio temas.

Kun pardonpetoj al: Odd Tangerud, Norvegio.

Senpaga numero de Heroldo

Sufiĉas sendi poŝtkarton al la redakcio de *Heroldo de Esperanto* (adreso: Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio), por senpage ricevi ekzempleron de la duobla numero de la gazeto kun ilustrita raporto pri la U.K. en Bergen. Kiel ĉiuj scias, la grand-formata *Heroldo de Esperanto,* fondita en 1920, pli ol 70 jarojn estas la plej ofte aperanta kaj la plej populara internacia periodaĵo en la lingvo de Zamenhof.

La asteria (marstela) ĵetisto.

Dum maljunulo promenadis laŭ la marbordo ĉe tagiĝo, li rimarkis, ke antaŭ li, junulo estis prenanta asteriojn kaj ĵetanta ilin en la maron. Fine atingante lin, la maljunulo demandis kial li faris tion. La respondo estis, ke la fiksiĝaj asterioj mortus se restus tie ĝis la sunleviĝo. "Sed la marbordo etendiĝas ĝis la horizonto kaj estas milionoj da asterioj", kontraŭis la maljunulo. "Kian diferencon faras via klopodo?" La junulo rigardis la asterion en la mano kaj ĵetis ĝin al sekureco en la ondojn. "Tio faros diferencon al tiu", li diris.

Tradukita el la angla de Prenda E.Cook.

REAGO KAJ KONKRETA PROPONO:

IO, KIO MANKAS EN NIA LABORO

Kun granda plezuro mi legis la proklamon de Voss kaj ĉiuj decidoj, rezolucioj de UEA kaj ILEI plaĉas al mi. Laŭ tiuj dokumentoj opiniante ke la grundo estas pli-malpli preparita, mi riskas elmeti mian proponon al publika kritiko kaj, ĉe aprobo, mi petas helpon por realigi la ideojn.

Kelkaj el la legantoj de IPR eble memoras la sciigon pri konstanta konkurso de lernejanoj (3/91, p. 12), al kiu pasintjare aliĝis en Hungario 9 lernejoj kun 241 geknaboj. Nun, en Novembro kun ĝojo mi povas informi nian membraron, ke la nombro de la lernejoj kreskis al 15. Ĉi-jare ni lanĉis alian konkurson (memore al K.Kalocsay) pri arta traduko. En ĝi partoprenis 8 lernejoj kun pli ol 100 geknaboj.

Kial mi parolas pri ĉio ĉi? Ĉar dum la pasintaj 15 monatoj evidentiĝis, ke ekzistas multaj pedagogoj, kiuj estas pretaj oferi tempon, energion, eĉ iom da mono por sia lernantaro. Samtempe montriĝis, nenio kontribuas pli efike al firmaj kontaktoj ol komuna laboro, en kiu ĉiu aktivadas laŭ sia forto. Probable neniu dubas pri tio: ne vortoj, sed faroj kreas kolektivon. Tiel same, certe neniu dubas, ke ni multe bezonas agemajn kolektivojn.

Por efektivigi tiun celon kaj por levi la lingvan nivelon de la lernantoj, por amikigi ilin trans la naciaj limoj, **mi proponas fondi** en la kadroj de ILEI **internacian laborkomisionon pri E-konkursoj por lernejanoj.**

Kiajn konkursojn mi trovus tre utilaj?

1) Ni ne ĉesigus la ĉiumonatan poentokolektan konkurson, kiu daŭras de Septembro ĝis Majo kaj pri kiu mi aludis ĉi-supre. Laŭ ĝisnunaj enlandaj spertoj ĝi estas internaciiginda.
2) La tradicia (en Hungario) deklamkonkurso povus alpreni la nomon de J. Baghy kaj transpasi la landlimon.
3) Apogindaj ŝajnas konkursoj (laŭlande) pri arta traduko memore al K. Kalocsay.
4) Estus tre utile lanĉi (memore al Ivo Lapenna) konkurson pri „modela parolo en Esperanto".
5) La pinto de la konkursoj povus fariĝi ĉiujaraj Olimpikoj de lernejanoj studantaj Esperanton.

La vico estas longigebla. Kio estas la avantaĝo de tiaj konkursoj?

a) Ili devigas la instruistojn kaj konkursantojn trejni sin kaj kompari siajn rezultojn al tiuj de la kolegoj. Tio estas neimageble forta movilo ĉe ambiciaj pedagogoj.
b) Nia instruistaro kaj lernantaro povus elpaŝi el la paraliziga izoliteco. Ili ekkonus unu la alian ne laŭ alparolo en iu somera E-kunsido, sed laŭ efektiva laboro.

c) La konkursoj efikus unuige en ĉiuj terenoj de nia aktivado, el kio multe profitus nia tuta membraro.
d) Ĉiu konkurso havus sian estron kaj aktivularon, sekve la tuta laboro, kiu sin direktus al unu komuna celo, estus bone dividita. Multaj niaj adeptoj fariĝus do pli agemaj tiel, ke neniu estus tamen tro ŝarĝita.

El ĉiuj skize prezentitaj aktivecoj profitus nia tuta kolegaro, lernantaro kaj, finfine kaj sendube: nia tuta movado.

Praktikantaj instruistnj, kiuj konsideras iun el la ideoj apoginda, subteninda, kaj kiuj sentas en si forton iom kontribui al ilia realigo, aŭ kiuj havas aliajn formojn de konkursoj, povas **aliĝi al ni**, skribante leteron al la adreso de la subskribinto. Cetere la konkursoj prezentitaj sub la unuaj tri punktoj, jam havas regularon, ĉiu povas konatiĝi kun ili, estas bezonata nur scivolemo kaj decidemo.

Esperante ke la ideo **fondi aktivan laborkomisionon pri konkursoj** interlernejaj fariĝos utila kaj fruktoporta iniciato kaj ke ĝi donos al nia movado almenaŭ iom da puŝeto antaŭen, atendas viajn reagojn kaj helpon

s-ro Géza Kurucz, Gimnazio Julia Bányai
H-6000 KECSKEMÉT, Nyiri út 11. Hungario


La propono estas praktika kaj bonvena, la estraro de ILEI februare traktos ĝin; se ĝis tiam alvenis pozitivaj reagoj el diversaj landoj, des pli bone.

Karlskoga komunikas

La Popola Altlernejo en tiu centresuda urbo de Svedio, kiu gastigis la lastan IJK, regule proponas bone organizitajn E-kursojn en brilaj ĉirkaŭaĵo kun modernaj faciligoj. Ok-semajnaj kursoj funkcias tie ekde 1988. Por 1992 okazos kurso por komencantoj de la 7a de januaro ĝis la 6a de marto kaj de la 24a de aŭgusto ĝis la 16a de oktobro. Daŭrigaj kursoj de la 16a de marto ĝis la 22a de majo kaj de la 26a de oktobro ĝis la 18a de decembro. Tiuj kursoj, inkluzive de loĝigo kaj du manĝoj tage kostas ĉ. 4900 svedaj kronoj.

Krome okazas somera kursaro, kun kursoj je kvar niveloj kaj sekve intensa esperanta etoso (ses studhoroj tage plus vesperaj aranĝoj) de la 6a ĝis la 11a de julio. Kosto ĉ. 1950 skr.

Petu prospekton de: Karlskoga Popola Altlernejo, Fako 192, S-691 24 Karlskoga, Svedio: tel. (0586) 503 60. Gvidanto: s-ro Lars Forsman.



RECENZOJ

Eduk-politiko en Germanio

Thomas Finkenstaedt - Konrad Schröder: Sprachenschranken statt Zollschranken? Grundlegung einer Fremdsprachenpolitik für das Europa von morgen (*Lingvaj baroj anstataŭ doganaj? Bazo por politiko pri fremdaj lingvoj por la morgaŭa Eŭropo*), Stifterverband für die Deutsche Wissenschaft, Materialien zur Bildungspolitik 11, Essen, 1990.

Broŝuron 60-paĝan donacis al mi germana kolego: ĝi eble atestos pri tipa sinteno de intelektuloj al tio, kion ni, e-istoj, jam tiom familiare nomas "la lingva demando". Kiel "materialo por eduk-politiko", ĝi atingos kaj opinie influos relative vastan tavolon de pedagogoj en Germanio.

La aŭtoroj prezentas koncize, sed kun germana precizo (multaj tabeloj kaj grafikaĵoj!) kelkajn aspektojn de l'problemo. Komence ili atentigas, tute ĝuste, pri la implikiĝoj de lingvo kaj potenco: sed hodiaŭ – ili konkludas – plej gravas la devizo: "la plej bona lingvo estas tiu de la kliento" (p. 10.). La dua ĉapitro nomiĝas "Lernita, ne kunnaskita", ĝi tamen akcentas la emocian ligitecon al onies unua lingvo kaj ties efikon je la posta lingvolernado. Ĝi mencias denaskan-edukan dulingvecon (tamen ne plurlingvecon), sed kiel escepton kaj plie kiel negativaĵon: "Sen la longa procezo de enhejmiĝo en la lingvokomunumo... oni suferas malavantaĝon, aŭ eĉ damaĝon: misrezulta dulingveco ĉe infanoj de diverslingvaj geparoj kaj la "duobla duonlingveco" ĉe multaj idoj de gastlaboristoj indikas, estiel misevoluo, la grandan signifon de ĝusta lingva eduko" (p. 11.).

Post rapida skizo pri la multlingveco de l'mondo ili konkludas, ke natura solvo per unulingveco ne eblas, ja iu ajn unusola lingvo disdialektiĝus, krome: "unusola lingvo en Eŭropo kiel lingvo de potenco iel ajn strukturita eĉ kiel ideo ne rajtas esti diskutata, tia ideo estus ja la komenco de l'fino por ebla unueco de Eŭropo.(...)Restas nur la vojo de plurlingveco pere de lingvoinstruado" (p. 17).

E-isto jam suspekteme atendas, ke "nia solvo", kvankam apartenanta al neniu potenco, ne estos do diskutata. Ĝi tamen rajtas je unu rekta kaj unu malrekta mencioj, aŭtoritataj sen klarigo: "nek la latina nek Esperanto povas transpreni la rolon de supernacia komuna lingvo en Eŭropo" (p. 21) kaj "Artefarita lingvo ne povas solvi la problemon" (p. 35.). En la bibliografio mankas mencio de verkoj pri Esperanto aŭ interlingvistiko. Pluraj ĉapitroj priskribas la situacion de lingvoinstruado en Germanio kaj Eŭropo, demonstrante, ke la bezonoj estas pli multspecaj ol la oferto de la lernejoj, kiuj favoras precipe la

anglan. Kiel helpi pri tio? La solvo estus: "kompreniva plurlingveco" (pp. 35-48.). Nome: la aŭtoroj bone perceptas la riskojn de komunikado inter "denaskulo" (*native speaker*, en la germana teksto) kaj lerninto de ties lingvo, sed laŭ ili ankaŭ la uzo de tria lingvo ne akcepteblas kiel ĝenerala solvo i.a. pro la malprecizeco kaj pro "malfacile kalkuleblaj emociaj reagoj" (p. 41.) de denaskaj parolantoj. Kvankam logike ne estus pluaj solvoj, la aŭtoroj kreas unu: ambaŭ komunikantoj parolas *sian* lingvon, kiun la alia komprenas, dank'al siaj pasivaj konoj, akiritaj en pli diversigita lerneja strukturo. Se la diabla multlingveco de Eŭropo malhelpus la funkciadon eĉ de tiu metodo, ĉar temas ekzemple pri ""malgrandaj" (dankon pro la citiloj! - I. E.), foraj kaj izolitaj lingvoj" (p. 47.), restas eliro:

"Jen ofertiĝas miksa modelo, laŭ kiu unu el la komunikantoj revenas al sia denaska lingvo, kiun la partnero komprenas, kaj kiu siavice uzas la internacian *lingua franca*. Ĉe unu flanko la kritikitaj malhelpoj kaj striktiĝoj ja okazas tiukaze, sed la alia ĉiam povas en sia denaska lingvo...redemandi, interpreti, ĝustigi ktp." (p. 47.) Bela demokratio por et-lingvanoj, kiuj devos aktive paroli la *lingua franca* (kiun lingvon do?) kaj kompreni pasive, se mi ne pasive miskomprenas, preskaŭ ĉiujn lingvojn de Eŭropo, ĉar ilia lingvo estos konata daŭre de nur malmultaj. Sed povas esti, ke tiam ambaŭ partioj tamen parolos la *lingua franca* (kazo ĵus kondamnita de l'aŭtoroj), aŭ – kiu scias? – ke ili ekparolos en siaj pasive konataj lingvoj, dank'al la kutima lerneja efikeco...

Ĉu la verkintoj serioze kredas pri tio? Mi timas, ke jes. Samkiel multaj intelektuloj, kiuj optimisme trumpetas nuntempe la dezirindan, sed ŝajne fantoman *reciprokan multlingvecon* de la estonta Eŭropo.

István Ertl

Etimologia Vortaro de Esperanto, Vol. 1: A–D – aŭtoro: Ebbe VILBORG; Eldona Societo Esperanto, Malmö; 1989.; 104 paĝoj; prezo: 26,40 gld ĉe UEA; fadenbindita, fleksebla kovrilo; 1a eldono; 17x24 cm; ISBN: 91 85288 17 9. (Intertempe aperis la dua volumo: E–Ĵ.)

Temas pri la unua volumo de la unua ampleksa etimologia vortaro de Esperanto. Por ĉiu radiko estas indikata 1) la okazo de la oficialigo; 2) la unua apero de la radiko; 3) la etimo de la radiko; ankaŭ la hispana ekvivalento, kiun Zamenhof verŝajne ne uzis; 4) eventualaj praesperantaj vortoj; 5) paraleloj en aliaj planlingvoj kaj kromaj interesaj informoj:

Ĉu vi ekzemple sciis, ke la vorto **cifero** signifis „nul" antaŭ ol ekhavi ĉirkaŭ 1400 sian nunan signifon? Ke **bojkoti** venas de la irlanda bienadministro **Boycott**, kiu estis punata en 1880 de farmista organizo per kolektiva rifuzo?

Entute valora, leginda libro por esperantisto, planlingvisto kaj lingvisto ĝenerale.

W. Klag, Aŭstrio.

The Explorative-Creative Way (La esplor-kreiva vojo; Apliko de humanisma lingvolerna modelo). Wil Knibbeler; Gunther Naar Verlag, Tubingen, 1989. ISBN 3-8233-4071-9. 23cm. 197p. Numero du en la serio 'Language in Performance' (Lingvo praktikata).


Ĉi tiu anglalingva libro havas klaran strukturon, glate legiĝas kaj estas zorge referencata; paŝon post paŝo ĝi prezentas la fonon kaj pravigon de ĉi tiu nova 'vojo'. La unua sekcio resumas diversajn ekzistantajn humanismajn alirojn al lingvo-lernado: la silenta vojo (Gattegno), sugestopedio (Lozanov), komunuma lingvo-lernado (Curran k.a.), kunflua edukado (Galyean) kaj fermiĝas per kritika analizo de la ĝenerale malsufiĉaj klopodoj difini sciencan bazon por apogi tiujn metodojn. Spite tion la aŭtoro evidente vidas valoron en ili. En la dua ĉapitro, li distingas inter lingvo-akiro kaj lingvo-lernado, kaj difinas serion de hipotezoj cele al la atingo de natura lingvo-lernado (t.e. ke en la lernado oni simulu tiujn procezojn, kiuj funkcias dum lingvo-akirado). La tria ĉapitro klopodas sintezi la valorajn trajtojn de la prezentitaj vojoj kaj hipotezoj en koheran sistemon. Por tio li formulas dek funkciigajn principojn:

esplorado: serĉemo trovi konstantaĵojn en la lernata lingvo
kreiveco: lingvo-uzo estas esence kreiva ago
motivigo komuniki: necesas deziri transigi iun mesaĝon
afekcio: diraĵo naskita el emocio estas tut-persona evento
ekonomio: tiri maksimuman komunikadon el minimumaj rimedoj, almenaŭ en la komencaj stadioj
nivel-taŭga enigo: simpligita lingva modelo foje pli taŭgas ol denask-parolanta
aŭtonomeco: la iniciatema lernanto sendependiĝos rapide de la instruisto.
riskado: riskado en situacioj de dubo estas kondiĉo por rapida lernado
memfido: memfido estas antaŭkondiĉo por lingvo-uzo
memaŭskultado: taŭga prononco kaj aŭdkapablo dependas je distingokapablo, kiun la lernanto akiras aŭskultanta kaj kontrolanta la proprajn eldirojn.

La kvara ĉapitro priskribas la personecajn trajtojn dezirindajn kaj malhelpajn en lingvo-lernanto. La kvina ĉapitro prezentas dekojn da specifaj lingvo-ekzercigaj teknikoj, ĉiuj celantaj stimuli unu el la dek donitaj principoj – ili impresas moderne kaj alloge. La sepa ĉapitro denombras la dezirindajn trajtojn de instruisto uzanta la esplor-kreivan vojon. La lastaj ĉapitroj prezentas la rezultojn de esplor-projekto starigitan en dudeko da klasoj kun deko da lingvoj por mezuri la efikecon de instruado laŭ tiu vojo en la manoj de tre malsamaj instruistoj.

La verko havas apartan intereson por ni, ĉar en unu el la klasoj oni instruis Esperanton, la instruisto estas nia aktiva membro, s-ro Oene Hoekstra, kaj sur unu kolora paĝo Esperant-lingva instru-afiŝo aperas, en kiu kolorigo de difini-

La ideala esplor-kreiva instruisto laŭ personeca testo.



taj literoj kuraĝigas lernantojn mem malkovri la vortkonstruajn principojn de Esperanto.

Unu elemento de la esploro estas submetigi la instruistojn al personecaj testoj. Dua estas observi lecionojn tra kelkmonata periodo, tria estas analizo de anonimaj demandiloj plenumitaj de la studentoj kaj instruistoj. La celo estis esplori kiel – kaj ne kiom bone – funkcias la metodo. La verko mem konfesas, ke ĝiaj esplor-rezultoj ne estas tre firmaj, sed ili estas nepre interesaj. La libro valoras ankaŭ ĉar ĝi donas trafan resumon de lastatempaj evoluoj en grava kampo de lingvo-instruado. Ĝi proponas plurajn paĝojn da bibliografiaj informoj pri ĉiu unuopa 'vojo', pri takso-teknikoj kaj dediĉas tridek paĝojn al la ciferaj kaj priskribaj esplor-rezultoj.

Recenzis: Stefan MacGILL

NEKROLOGO

Robert GÉRARD mortis la 2-an de oktobro. Li dum longa tempo estis instruisto pri historio kaj geografio en la Pariza gimnazio „Turgot", en kiu dum la postmilitaj jaroj (ekde 1946) li ekinstruis ankaŭ Esperanton kiel libervolan fakon. Por Robert Gérard la instruado de Esperanto suplementis la instruadon de historio kaj geografio kaj celis la edukadon de la junuloj al pacemo kaj internacia amikeco. Multaj tiamaj lernantoj eklernis Esperanton dank'al li. Instige de li, liaj Esperanto-lernantoj fondis la *Verdan Klubeton*, unu el la malmultaj lernejaj Esperanto-grupoj en tiu epoko.

Robert Gérard estis la aŭtoro de la esperantlingva parto de la libro Éléments de Géologie en six langues (Elementoj de Geologio en ses lingvoj), eldonita en Parizo en 1965, kiu pioniris sur la tereno de la esprantlingvaj geologiaj eldonaĵoj.

Propaganda verko kun misoj kaj mankoj

Bernard Golden

Recenzo pri *Esperanto: the universal secondary and intermediary langauge* de Edward Carlton. Gooday Publishers, East Wittering, West Sussex, Anglio. 1990. 21,5 x 13,5 cm. ISBN 1-870568-25-7.

Kvankam sur la titolpaĝo (pĝ. III) tekstas *Toward a Better Understanding*, ĝi vere estas subtitolo kiu ne rivelas la enhavon de la libro. La ĝusta titolo, indikita ĉi-supre, aperas sur la librokovrilo. La celo de tiu ĉi anglalingva propaganda verko estas ebligi al nefakaj legantoj, interesiĝantoj pri la internacilingva demando, informiĝi pri aktualaj lingvaj problemoj en la mondo kaj ekkoni Esperanton por povi pritaksi ĝian strukturon kaj stilon. Elementoj de la gramatiko estas prezentitaj, kaj akompanas la klarigojn frazoj kaj vortlisto en Esperanto kun apudaj anglaj ekvivalentoj. Temas pri supraĵa kaj nesistema superrigardo de la lingvo. Krom la gramatikaj pritraktoj, la aŭtoro spekulativas pri la deveno de la homa lingvo, priskribas la metodologion de lingvoinstruado kaj la procezon de lingvolernado, kaj informas pri la historio kaj rolo de Esperanto. Tiu heterogena materialo ne estas traktita konsekvence, ĉar estas saltoj de unu temo al alia kaj ofta ripetado. Longaj, kelkfoje tutpaĝaj, vortlistoj, same kiel izolitaj frazoj ne konsistigas altiran leg-materialon. Efektive, sufiĉas por ilustri regulojn nur kelkaj ekzemploj, ne dekoj da vortoj kaj frazoj. Kio evidente mankas en la libro por doni nocion pri la stilaj trajtoj de Esperanto, estas mallongaj legaĵoj ĉerpitaj el beletraj verkoj, fakaj publikaĵoj kaj ankaŭ gazetartikoloj – ĉiuj akompanataj de anglaj tradukaĵoj.

S-ro Carlton mem klarigas, ke lia libro ne anstataŭas lernolibron de Esperanto: ĝi servas nur kiel enkonduko. Tio estas granda seniluziigo. Homo, kiu jam elspezis preskaŭ naŭ pundojn por libro, kiu ne instruas Esperanton, devas, se li volas alproprigi la lingvon, elpoŝigi pli da mono por akiri veran lernolibron kaj eventuale, vortaron. Kiel li faru tion? Ankaŭ ĉi-rilate la libro estas mankhava, ĉar ĝi ne provizoras adekvatajn informojn pri rimedoj por plulernado. Sur pĝ. 220 estas magra, bibliografie nekontentiga listo de didaktikaj materialoj, bedaŭrinde kun dubinda utilo. La lernolibro de Cox, eldonita en 1928, jam de longe estas elĉerpita; kaj ne rekomendindaj estas la kaosa verko de Butler kaj la pedagogie malnovmoda lernolibro de Downes. Ja estas paradokse, ke la aŭtoro plurloke en sia verko pritraktas la uzon de komputeroj por diversaj aspektoj de lingvo-instruado kaj lernado, sed li neglektas inkludi en sia listo modernajn lernilojn kiel la *Spectrum 48 Computer Course* kaj la kasedan kurson *Jen nia mondo*. S-ro Carlton volas konvinki siajn legantojn, ke Esperanto estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj (pĝ. 50–51.) Kial, do, li ne demonstras tion per konciza kurso en la propa verko? (Gaston Waringhien sukcesis fari tion en sia 74-paĝa franclingva broŝuro *A.B.C. d'Espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres*.) Se skeptikaj legantoj demetos la libron

pro manko de konvinkiĝo, plej probable ili duan fojon ne okupiĝos pri Esperanto.

Ankoraŭ unu grava difekto de la prezentado de Esperanto en tiu ĉi libro, estas la impreso, kiun ĝi donas, ke Esperanto estas nur lingvo Malestas pritrakto de la homa elemento, la vivanta lingvokomunumo, kiu uzas la lingvon aktuale kaj praktike. Bezonata estas ĉapitro kun priskribo de agadoj en Esperantujo: internaciaj movadoj, landaj asocioj, junular-grupoj, fakorganizaĵoj, kongresoj, konferencoj, seminarioj, korespondado, turismaj aranĝoj, pasporta servo, publikigo de libroj, revuoj, diskoj, kasedoj, disaŭdigo de radioprogramoj, ktp. Kiel propagandilo, la libro maltrafas sian celon: montri, ke Esperanto servas por pli bona interkomprenado. Sur pĝ. 220 estas nur du adresoj, al kiuj oni povas skribi por peti pli da informoj: Esperanto-Asocio de Britujo kaj UEA. Sed la eldonejo en aparta reklamilo informas, ke la libro estas havebla ĉe distribuantoj en Aŭstralio, Usono kaj Nov-Zelando; kial, do, ne estis aldonitaj al la listo la landaj asocioj en tiuj tri landoj kaj ankaŭ tiuj en ankoraŭ du anglalingvaj landoj, Kanado kaj Sud-Afriko?

Ne estas loko tie ĉi prikomenti detale la lingvan nivelon de la libro. Kelkaj ekzemploj sufiĉos pro ilustri la misojn kaj mankojn. La enkrampaj ciferoj indikas la paĝojn. Altiras la atenton kelkaj faktaj eraroj. En la ĉapitro pri fonetiko la aŭtoro klasifas la sonojn /k/, /g/, /h/, /ĥ/ kaj /j/ kiel palatalajn (30). Nur /j/ estas palatala: /k/, /g/ kaj /ĥ/ estas velaraj, kaj /h/ estas glotala. Skribante pri la Akademio de Esperanto (218), li misinformas, ke ĝi konsistas el proks. 80 membroj; fakte temas pri proks. 40. Cetere, la menciita Lingva Komitato jam de longe ne ekzistas. Plurloke en la libro estas aludoj al la rilatoj inter Unesko kaj Esperanto, sed ĝis nun tiu organizaĵo ne adoptis Esperanton por oficiala uzo. Ĉiuj ĝiaj belsonaj rezolucioj estas nur surpaperaj aferoj sen praktika valoro.

Plurloke Esperantaj vortoj estas mistradukitaj en la anglan. Jen kvin ekzemploj. La frazo „ambaŭ filinoj estas en la oficejo" (71) estas tradukita kiel *both girls are in the office*. „Filino" estas *daughter*, ne *girl* (knabino, junulino). „Pentekosto" (157) ne estas *Easter* sed *Pentecost* aŭ *Witsun (tide)*; *Easter* estas „Pasko". „Ĉeforkestro" (169) ne estas *conductor* sed *main orchestra; conductor* estas „orkestestro" aŭ „dirigento". „Orkestraro" (203) ne estas *members of the orchestra* sed *group of orchestras; members of the orchestra* estas „orkestranaro". „Potoj kaj panoj" (179) ne estas *pots and pans* sed *pots and breads; pots and pans* estas „potoj kaj patoj".

Esperantaj vortoj estas uzataj sur la unuaj paĝoj de la libro, sed prononcreguloj aperas nur poste sur pĝ. 36. Simila nekonsekvencaĵo rilatas al la refleksivo. Ĝi mankas en la listo de personaj pronomoj sur pĝ. 68, sed la adjektiva formo estas uzata en frazoj sur la sekva paĝo; tamen oni devas atendi ĝis pĝ. 75 por legi klarigon pri tiu gramatikaĵo. Kvankam la aŭtoro plurfoje akcentas la gravecon de la akuzativa kazo en Esperanto, troviĝas kelkaj frazoj, en kiuj ĝi mankas: „Metu vian fingron sur ĝi" (79), „Ne enmetu viajn fingrojn en ĝi" (79) kaj „Li montris al mi la kvino da pikoj" (155). Kelkaj gramatikaj klarigoj estas

neortodoksaj, eĉ eraraj. La frazoj „diru min" kaj „mi skribas lin" (147) devas esti „diru al mi" kaj „mi skribas al li"", ĉar „diri" kaj „skribi" bezonas dativan objekton (al-objekton), kiam temas pri persono.

La aldonita slipo kun listo de preseraroj similas al la pinto de glacimonto. Atenta legado malkovras multe pli – plurajn dekojn! Jen selektita dudeko: *Ludovich* (18) = *Ludovik*; aseno (21) = azeno; kuzions (69) = kuzinon; *garcon* (73) = *garçon*; *an* (85) = *and*; *or* (86) = *for*; manĝanta (87) = manĝata; sajnan (92) = sanan; flegiĝis (94) = flegistiniĝis; devigatoj (99) = devigataj; fredmdojn (99) = fremdajn; *seal-level* (126) = *sea-level*; *Agebra* (152) = *Algebra*; *poret-monnaie* (159) = *porte-monnaie*; malbonem (164) = malbona; balaiaĵo (176) = balaaĵo; *nigh!* (188) = *night!*; kopeo *coupée* (200) = kupeo *coupé*; kaŝludo (205) = kaŝludo; amnesto (213) = amnestio. Sur pĝ. 72 mankas ĉiuj supersignoj super la litero „c" en la kolumno *„every"*, kaj ankaŭ super „C" kaj „G" sur la sekva paĝo.

La kvanto kaj specoj de misaĵoj priskribitaj ĉi-supre ne estas tolerendaj en verko havanta didaktikan celon.

Bernard GOLDEN
Damjanich u. 1/C. I. 8.
H-8200 Veszprém

Roseanna – aŭtoroj: Maj SJÖWALL kaj Per WAHLÖÖ; tradukita de Malte MARKHEDEN el la sveda; Progreso Eldonejo Motala, Svedio; 202 paĝoj; fadendbindita kun mola kartonkovro; prezo: 88 svedaj kronoj ekster Svedio; bela foto ekstere; 1a eldono 1990; 21x15 cm; ISBN 91-87320-07-X.

La eldonejon PROGRESO oni jam konas de la PULPO-libroj, kiuj estas bonege tradukitaj kaj belege ilustritaj. Jen la enhavo de ROSEANNA: Sur la pasaĝerŝipo DIANA dum veturo sur la turistvojo GÖTA-kanalo murdiĝas juna virino, kiun oni poste trovas sube de la kluzoj ĉe Borenshult en Motala. La geaŭtoroj estas konataj verkistoj de detektivromanoj. Kelkaj el iliaj romanoj estas filmigitaj.

Laŭ la enhavo la verko plaĉis al mi. Ĝi estas flue legebla; komencinta oni plimalpli devas legi la tutan romanon. Bedaŭrinde la traduko tute ne povis kontentigi min. Preskaŭ sur ĉiu paĝo mi trovis almenaŭ unu lingvan neklaraĵon aŭ fuŝon. Ĉu oni povas *gargari la vizaĝon* (paĝoj 176 kaj 186)? Kio estas *kuŝi veka*? Dufoje oni legas angle-esperante *ten minutoj poste* (p. 52 kaj 95). Iu *elcindris sian pipon* (p.56). Io *donis same malbona rezulto* (p. 91). *Homoj estus aŭdinta (p. 91).* *Tio ne estas vere* sur paĝo 194. Oni estas *needziĝita* (p. 146). Kaj tiel plu.

Mia konkludo: tia entute valora romano meritus pli bonan tradukon.

Walter KLAG

LETERKESTO

Malfermita letero al la Esperanto-kursgvidantoj

KIAL INSTRUI ESPERANTON?

En artikolo titolita „Fremdlingvoj: la ega seniluziiĝo" (*Famille Magazine*, Paris, majo 1991), ĝenerala inspektisto pri fremdlingvoj, skribas i.a. ke por lerni fremdlingvon studento bezonas **motivegon, senĉesan kontakton kun la lingvo** kaj plurajn restadojn en la koncernata lando.

Alia inspektisto pri fremdlingvoj kutime diris, ke tiurilate lernanto bezonas trionon da inteligenteco, trionon da motivo kaj trionon da laboro, sed ke tiu-ĉi dependas de la motivo. Sekve gravega punkto, ankaŭ por lerni Esperanton, estas la motivo! Pro tio, niaj Esperanto-kursgvidantoj regule demandu sin pri la celado de sia kurso. Neniel estu por plezurigi sin mem, sed por renkonti kaj sproni la motivojn de siaj lernentoj.

Precipe en kursoj organizitaj de la Esperanto-grupoj, ŝajnas ke tro ofte la ununura celo estas varbi novajn anojn kaj esperantigi homojn laŭ la motivo de la kursgvidantoj... sen atenti tiujn, kiuj instigis la lernantojn aliĝi al la kurso. Gravega tasko de kluba Esperanto-instruanto estu bonege informiĝi pri la individuaj motivoj kaj regule nutri ilin per trafaj sciigoj. En lernejaj kursoj, endus ke ILEI fonde esploru laŭnivelan celaron. Jen kelkaj sugestoj:

elementa lernejo
riĉigo de la gepatra lingvo (radiko + afiksoj)
rekono de gramatikaj elementoj (nomo, verbo, adjektivo, adverbo)
flegado de la kreativeco, k.s.

mezgrada lernejo
komparo kun aliaj lernataj (-otaj) lingvoj
enkonduko al internacia pensado
internacia korespondado, k.s.

universitata nivelo
fakrilatoj kun alilandaj samfakuloj (i.a. sine de AIS —- Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino)
sciencaj esploroj pri la lingvo
instruado de Esperanto, k.s.

Ne sufiĉas veki intereson pri la Internacia Lingvo per trafa informado, nepras ankaŭ dece instrui kaj utile aplikadi ĝin.

Kolege via: Germain PIRLOT, Steenbakkersstr. 21, B-8400 Oostende,

Observante nunan staton de nia movado, mi venis al konkludo, ke ni tro ofte, bedaŭrinde, pistas akvon, ĉar nia instruado ne donas tiujn rezultojn, kiujn ni volus vidi. Dank'al nia Majstro, ni havas bonajn argumentojn por varbi la homojn lerni Esperanton: kaj facileco, kaj logikeco kaj tiel pluecoj. Sed kio okazas post fino de la kurso? Mi demandis multajn instruistojn kaj la rezulto estas ĉie preskaŭ la sama — 1–2 homoj restintaj en la movado post la fino de

la elementa kurso estas konsiderata kiel bona. Kion proponas mi? Uzi la Internacian Lingvon laŭ ĝia destino! Kiel?

Organizi por la kursfinintoj specialajn renkontiĝojn nepre en aliaj landoj, Mi estas preta ellabori specialan programon por 5–7-taga restado en Kievo por tiaspecaj grupoj. Eble la grupoj estu kelkaj el diversaj landoj. La programo konsistos el ekskursoj, diversaj konkursoj, renkontiĝoj kun esperantistoj... Estos konsideritaj ankaŭ aliaj proponoj pri la programo.

Sed mi volas, ke la samon oni faru por kursfinintoj el Kievo (eble ankaŭ el aliaj ukrainiaj urboj).

Ĉu ni lanĉu interŝanĝon de la novicoj? Kiel oni diras: se ne ni, do kiu?

Miĥail Lineckij, Direktro de Centro „Esperanto",
SU-254200 Kiev-200 P.K. 539/1.

Enketo pri klaso-interŝanĝoj

En Svislando estas kvar kulturoj, kvar naciaj lingvoj. Tri el tiuj lingvoj estas oficialaj lingvoj. Celante interkonatiĝon inter la kulturanoj kaj bonan lernadon de lingvoj naciaj, la svisa registaro okazigas kaj subtenas *klaso-interŝanĝojn*. Tiuj renkontiĝoj daŭras unu semajnon: la lernantoj loĝas ĉe la familio de la aliaj lernantoj, ili frekventas kune la lernejajn kursojn, ili ekkonas la regionon de siaj novaj geamikoj.

Ĉar mi respondecas pri tiuj kontaktoj inter la gelernantoj por mia kantono Neŭŝatelo (kantono = svisa provinco), mi ŝatus scii de alilandaj instruistoj, se via lando estas plurkultura:

— ĉu estas celo de la registaro helpi al interkonatiĝo kaj alproksimiĝo de la homoj malsamkulturaj?
— se jes, ĉu unu el la rimedoj tiucele estas klaso-interŝanĝoj?
— se jes, ĉu via registaro uzas aliajn rimedojn?
— se aliajn rimedojn, kiujn?

Se mi ricevus po unu respondon el ĉiu lando, kien iras IPR, (eble de la sekciestro), mi estus ege feliĉa. Mi per eta donaco dankos al la informintoj.

El Belgio mi jam ricevis sufiĉe da informoj; dankon.

Mireille Grosjean
Temple 20. CH-2416 Les Brenets

JAM NUN ESTAS TEMPO REALIĜI AL ILEI POR 1992. KONVINKI AMIKOJN KAJ KOLEGOJN, KE NIA REVUO, KONFERENCO, GIMNAZIO, KONTAKT-EBLOJ KAJ AGADO GRAVAS KAJ ALLOGAS! MEMBRIGU ILIN!

BUĜETOJ ILEI 1991 (reviziita) kaj 1992 (akceptita en Voss):svedaj kronoj


Rimedoj	Buĝeto 90	Rezulto 90	Buĝeto 91 (aŭg 90)	Buĝeto 91 (aŭg 91)	Buĝeto 92 (aŭg 91)
Membrokotizoj	27.000	29.016:73	30.000	30.000	32.000
Libroj, por kotizoj	600	235:81	600	600	500
Koleghelpa kaso	500	-	500	500	500
Fondaĵo Szerdahelyi	8.000	14.977:56	5.000	5.000	5.000
Konferenco (nete)	1.000	8.822:18	2.000	1.000	2.000
Kompensoj UEA	8.000	6.654:00	9.000	9.000	9.000
Eldonado (nete)	-	4518:90	-	3.000	10.000
Ekzamenoj (nete)	-	909:98	-	-	-
Rentoj	9.800	8.150:58	9.800	8.000	8.000
Donaco	-	1663:50	-	-	-
SUME:	**54.900**	**74.949:24**	**56.900**	**57.100**	**67.000**
Kostoj					
IPR	30.000	37.177:55	31.000	31.000	35.000
Eldonado (nete)	5.000	4957:37	15.000	-	-
Afranko, telefono	3.000	2.848:18	4.000	4.000	5.000
Presaĵoj, fotokopioj	4.000	3.722:21	5.000	5.000	5.000
Ekzamenoj (nete)	800	-	2.000	2.000	1.000
Metodikaj kursoj	540	548:10	100	100	2.000
Estraro	3.000	6.300:33	3.000	7.000	8.000
Honorarioj	2.400	**-	5.000	8.000	12.000
Konferencaj kostoj	-	355:86	-	-	3.000
Juna amiko	-	-	-	1.500	2..000
Koleghelpa kaso (nete)	-	100:00	-	-	-
F. Szerdahelyi		-15.121:57	-	-	-
Bankkostoj		240:00	-	-	-
Kotizo UEA		768.54	*	*	*-
Azia agado		688:00	-	-	-
SUMO	**48.740**	**72.827:71**	**65.100**	**58.600**	**73.000**

La supra prezento celas doni superrigardon pri la evoluo de la financoj de la Ligo. La sumo por IPR en 1990 altas, ĉar ĝi kovras kvin numerojn. La rubriko 'eldonado' aperas kaj sub rimedoj kaj sub kostoj (rezervo por estonta eldono), sekve la vera neta rezulto estas la diferenco: malgajno de 438:47 SEK. En la buĝetoj la enspezoj por Fondaĵo Szerdahelyi ne estas transigitaj al kapitala konto, kiel en la rezultoj 1990 – estonte la Fondaĵo komencos kovri difinotajn agadojn de la Ligo. La konferencaj kostoj en 1990 rilatas al Voss; tiuj en buĝeto 1992 celas honorarii deĵorantojn en la budo, helpantojn en la ekzamenoj kaj Tago de la Lernejo k.s.
* = Aldonenda ** = Rezervo de 1920 SEK kreita por neelpagitaj honorarioj.

Kiom plenpakita numero de IPR! Kelkajn erojn ni devis ellasi (artikolo pri la fremdlingva instru-politiko en tri aziaj landoj, pluraj recenzoj). Sed nia buĝeto absolute ne permesas al ni aldoni ekstrajn paĝojn dufoje sinsekve. Do, ili transiros al la sekva numero. Fine, ni et-litere kaj telegraf-stile resumu la nuntempan staton de la labortablo de la Ligo:

Sekcioj kaj membroj:

Post la anonco de reprezentanto en Rumanio en la pasinta numero, ni ĉi-foje anoncas reprezentanton en Albanio, kie ILEI havas bonajn kontaktojn kun la refloranta movado (vidu raporton pri kursoj en Juna amiko 91/3, p. 10). Esperebl e ambaŭ baldaŭ evoluos ĝis sekcioj. Al la nefunkciantaj sekci(estr)oj en Japanio kaj Sud-Afriko iris la lasta en serio de revivigaj alvokoj. Nia estrarano, d-ro So Jin Su baldaŭ vizitos Japanion kaj klopodos akiri kontaktojn cele al (re)starigo de funkcianta sekcio. Li plie kontaktados kun la aktiva ĉina sekcio, kaj vidas bonajn perspektivojn kreskigi la korean sekcion, kie universitataj rondoj abundas. En Usono la nova prezidanto de la sekcio estas s-ro John Victery.



En sia februara kunsido la estraro pritraktos proponon kun regularo, kiun pretigis la koncerna estrarano, Marija Beloŝević. Ĝi starigos konkurson inter la sekcioj; ĉiujare ĵurio decidos, kiu el ili plej aktivis laŭ serio de kriterioj. Ni imagas lanĉi tiun konkurson en 1992 pri la jaro 1991. Do, aktivintaj sekcioj, jam kompilu liston de viaj faroj, kiujn vi devas ĉiuokaze laŭstatute prezenti al ni frue en 1992. (Ni dissendos enketilon marte.)

Ekzamenoj:

Depost la lasta raporto okazis multkapa sesio en Belgio kun 14 sukcesintoj (niveloj nekonataj ankoraŭ), en Subotica okazis sesio, sed pro la cirkonstancoj, nur du kandidatoj prezentiĝis, ambaŭ sukcesis en la meza ekzameno. Fine de novembro, dek el dek unu kandidatoj sukcesis meze en Szombathely, Hungario. Devis okazi sesio en Vraca, Bulgario fine de oktobro, sed ne atingis nin raporto ankoraŭ. Jarfine ni atendas kurson en la Dua Afrika Kongreseto kaj plian sesion en Ĉinio. Verŝajne ĝis la jarfino la nombro de sukcesintoj atingos 200.

Notu alian adreson por la nova sekretario de IEK: s-ino Marie Hunninck, Centre Culturel 'La Charité', Esperanto, B.P. 136, F-84200 Carpentras, Francio.

Informado:

Nia estraranino Marija Beloŝević sukcesis aperi almenaŭ dufoje en la kroatia televido, sume dum ĉ. 30 minutoj, parolinte i.a. pri la Universala Kongreso, ILEI kaj ĝia konferenco kaj rezolucioj, kaj la rezolucio de IKEL. Plie, ŝi novembre reprezentis la Ligon en Seminario de TEJO en La Chaux-de-Fonds, kie ŝi havis okazon prezenti la laboron de ILEI kaj aŭskulti kelkajn reagojn kaj kritikon pri nia ne sufiĉe alloga aspekto el junulara vidpunkto. Ŝian plenan raporton ni povos nur poste aperigi. Nia Vic-prezidanto, d-ro Glossop, pretigis raporton pri la Esperanta partopreno en la Haga konferenco de la Asocio por Natur-Dotitaj Infanoj, kiu aperos nacilingve en la prestiĝa revuo 'Language Problems and Language Planning.' Li skribis nianome leterojn al edukaj altranguloj en Portugalio kaj Pakistano, subtene al kampanjoj de esperantaj instancoj tie.

Statuto:

Nia komisiito, s-ro Hoekstra, pretigis reviziitan dokumenton, surbaze de la diskutoj en Voss. Ni distribuos tion unue al la sekcioj por studo. Restas unu nesolvita punkto, pri kiu sekcioj povos esprimi sin. Post la praktika elprovo en la komitatkunsidoj en Bratislavo, ni presigos la tekston. Kiu deziras ĝin intertempe, turnu sin al sia sekciestro.

Universitatoj:

El Santiago de Compostella, Hispanio, venis la dua bulteno de la projekto pri la Preuniversitataj projektoj, al kiu ILEI sendis la petitan apog-leteron. Ĝi ĉefe komunikas progreson en la pretigo de la necesaj studo-

tekstoj kaj montras elĉerpaĵojn el kelkaj el ili.

Konferencoj:
La mezaj paĝoj de la nuna IPR donas la vaste atendatajn informojn pri nia tuja konferenco kaj la lanĉata Gimnazio – fruan aliĝon ni forte petas, por helpi nin plani ĉi tiun mult-rilate neordinaran konferencon. Kontaktoj estas starigitaj kun nia sekcio en Hispanio kaj aktivulo en la LKK de la UK en Valencio, cele al preparado de Konferenco por 1993.

Eldonado:
Sesdek paĝoj (preskaŭ duono) de la metodika studlibro de Mag. I. Szanser estas kompostitaj. La lernolibro Gubbins venis al halto pro erarvaginta kontrakt-letero inter Hungario kaj Italio; nun ruliĝas denove. Ni negocas kun hungara eldonejo pri kuneldonado de libro de prelegoj en socio-lingvistika konferenco, en kiu la ĉefa artikolo estas de Prof. I. Szerdahelyi. La dua kajero de 'Tendaraj tagoj' bedaŭrinde ĝis nun tute ne sukcesis progresi; nek la apogaj lerniloj. La unua kajero bone disvendiĝadas. UEA konsentis eldoni la tekston de s-ro Symoens pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, sed progres-raporto ne estas.

La antaŭlasta novaĵo estas signifa, ĝi rilatas al 'Juna amiko', sed ankoraŭ ne estas matura, do pri tio vi legu venont-numere aŭ en cirkulero al la sekcioj.

La lasta novaĵo rilatas ankaŭ eldonadon, sed estas tiom specifa, ke ĝi meritas apartan kadron, kiu trovos lokon, nur se mi tuj fermas la rubrikon, kion mi nun sen plia prokrasto – krom unu bondezira – faras.

Stefan MacGill, prez.

12 dec 91. *S.*

NIA REVUO EN 1992

Verŝajne pluraj legantoj jam ricevis la informon pri la sukcesa kandidatiĝo de nia redaktoro, István Ertl, al la posteno de redaktoro de revuo *Esperanto* de UEA, ekde la komenco de 1992. Sekve nia modesta revuo devas kore danki kaj adiaŭi lin, kaj bondeziri sukceson en la nova entrepreno.

La estraro de ILEI sukcesis trovi kaj akceptis novan redaktoron por IPR, ne nur el la sino de la sama urbo, Budapeŝto, sed eĉ el la nuna redakcia stabo. Sekve, la revuo senperturbe pluiros. La nova redaktoro estos la estrino de la hungara ILEI-sekcio, KOVÁCS Márta, Ady Endre u. 23-25C, H-1221 Budapeŝto, Hungario. Tio fariĝos la oficiala adreso de la revuo. Vic-redaktoro iĝas Ŝtefan MacGILL. Kunlaborantoj serĉataj!

La eldonskemo por 1992 estas la sekva:

NUMERO	Limdato	Presado	Inkluzivos
92/1	15 januaro	marte	Raporton pri la februara estrarkunsido Rezulton de la lerneja enketilo 91/92
92/2	15 aprilo	junie	Raportojn de la Landaj Sekcioj Konferencajn dokumentojn
92/3	15 aŭgusto	septembre	Konferencajn rezultojn
92/4	15 oktobro	decembre	Eventuale enketilon 92/93

Mallongaj sciigoj pri aktualaj temoj aŭ venontaj eventoj povas esti akcepteblaj iom post la anoncitaj limdatoj, sed ju pli frue, des pli bone.

Bonan novjaron deziras la redakcio al la legantaro!

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio : Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Bulgario : Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉeĥio : --- *nomota* ---
Ĉinio : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept. 29-34, North Part, Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio : Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EST-200001 Tallinn, Estonio
Finnlando : Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio : Edmond Ludwig, 26 Route de la Schlucht, F-68140 Münster
Germanio : Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio : Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio : *vakas*
Pollando : *Turnu vin al E-Centro Bialistoko, ul. Piasta 52/21, PL-15-044*
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko : Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando : Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo : Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Albanio : Bardhyl Mezini, p/a Albana Esperanto-Ligo, Gafur Muĉo, Rruga «Thanas Ziko» Nr.56, Tirana
Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafr. Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Rumanio : Angela Stoica, Platanilor 17, Sc. C, ap.4, R-1900 Timişoara; tel.(961) 59806
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende; tel. (059) 70.87.00
Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle; tel. (071) 43.62.05
Eŭropa Komunumo 92 kaj informado en internaciaj pedagogiaj medioj : E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (32 3) 666.62.66
UN-Jaro de la Familio 94 : MacGill-Glossop
Gazetara Servo : W. Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (43 222) 36.86.29
Terminologio : K. Smideliusz, Apáczai sétány 10, H-9700 Szombathely, Hungario; tel. (36 94) 20-313
Statuto : O. Hoekstra & R. Moerbeek, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (31 2209) 15.65

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C), 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris. **Reprezentanto de ILEI:** François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag
KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj nete per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, aŭ komputile sur 5,25-colaj disketoj per IBM-PC-kongrua sistemo kaj konata tekst-prilaborilo, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon). Skribu viajn nomon kaj adreson sur la manuskripto.

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 50 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.